

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



Ho, kiam ŝvelas la vira koro . . .

N:r 8-9.  
N-o 8-9.

Aug.-Sept. 1934.  
Aug.-Sept. 1934.

Pris 25 öre.  
Prezo 25 oeroj.

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: *Bernhard Eriksson.*

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.

Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.

Lösnummer 025.

Annonspris: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

## SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: *Bernhard Eriksson.*

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas  
2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

## Svenska Esperanto-Förbundet

(*Sveda Esperanto-Federacio*)

Adress: *Stockholm 1.*

Sekretariatets adress: *Fredsgatan 4.*

Postgirokonto N:r 2012.

Årsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: *Paul Nylén, Huddinge.*

Telefon: *Huddinge 279.*

Sekr.: *Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.*

## Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: *Box 698, Stockholm.*

Postgiro 515 11.

Avd. för examens- och språkfrågor: *Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295.* — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: *E. Malmgren.*

## Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(*Sveda Instruista Esperanto-Federacio*)

Ordf.: *Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.*

Sekr.: *Gustav Rimberth, Kommendörs-gatan 41, Göteborg.*

Kassör: *Oskar Svantesson, Karl Johans-gatan 61, Göteborg.*

Årsavgift 2:— kr.

## Läroböcker, Ordböcker

m. m.

*Systematisk kurs i Esperanto.* Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

*Esperanto utan förkunskaper.* Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

*Övningsbok till d:o.* ..... 0:50

*Snabbkurs i Esperanto.* Av Seppik-Malmgren. Särskilt avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal ..... 0:60

*Kurs i Esperanto. Del I.* Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. .. 0:90

*D:o. Del II. Läsebok.* ..... 0:90

*Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirklar.* Av Jan Masiak. .... Inb. 2:50

*Kommentarer till d:o.* ..... 1:—

*Esperanto-Kurso.* Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

*Esperanto-Grammatik.* Av Lärov.-adj. Nils Nordlund. .... 1:50

*Nyckel till Esperanto.* Miniaturlärobok med ordlista. .... 0:10

*Dubbel Fickordbok i Esperanto.* Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

*Esperantisk-svensk Ordbok.* Av P. Nylén. 232 sid. .... Häft. 3:75

*D:o, inb. i hållbart klotb.* .... 5:—

*Svensk-Esperantisk Ordbok.* Av G. H. Backman. Slutsåld.

*Barbro kaj Eriko,* en trevlig läsebok, helt på esperanto ..... 0:60

*Prepositionerna i Esperanto.* Av N. Nordlund. .... 0:75

*Fundamenta Krestomatio.* Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. .... 3:25

*Dialogoj en Esperanto.* Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. .... 0:50

## Förlägsföreningen Esperanto u. p. a.

*Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.*

*Tel. 31 65 01.*

*Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.*

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader.

Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

# ESPERANTO-TIDNINGEN

## LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

# La XXVI-a: "Unu el la plej agrablaj, plej bone organizitaj, plej bonsukcesaj el ĉiuj ĝisnunaj kongresoj — — —" (Her. de Esp.)

*Fina do la XXVI-a! Fina la du-jara prepara laboro. Fina la ĉiama, laciĝa, detala laboro. Fina la diskuto en LKK-kunvenoj, kaj fina ankaŭ la ĉiama timo pri ekonomia malsukceso — sed finaj ankaŭ la treege agrablaj festotagoj, la brilaj tagoj de sukceso kaj korvarmiga samideaneco.*

Ĉu ni diras tro multe, se ni kuraĝas mem konstati ke la kongreso estis sukceso? Oni ja ne devas mem prijuĝi siajn farojn, sed laŭ ĝeneralaj diroj de la kongresanoj, vere devas esti tiel, ke la Stokholma kongreso fariĝis unu el la plej festaj kaj agrablaj. — — —

Ke estis mankoj, eĉ multaj, tion la aranĝintoj certe devas atesti. Multaj estus eviteblaj se ne malfavoraj okazoj estis, kaj multaj dependis, kiel ĉiam kiam lastminute alvenas amasoj da sin antaŭe neanoncintaj partoprenontoj, ĝuste de la multa tiurilate ekstra laboro.

Tiuj mankoj precipe en la unua kaj dua tago estis rimarkeblaj, kaj okazigis

de tempo al tempo bruon, riproĉojn, neplenumoblajn postulojn. Sed ene interne la esperantistaro estas kore komprenema kaj indulgema popolo, kaj iom post iom la altaj, furiozaj ondoj de la rapide ekaperanta kolero ŝanĝiĝis en afabla toleremo, kaj la malfeliĉaj vizaĝoj de la bedaŭrindaj pekintoj same iom post iom reprenis sian ĝenerale animtrankvilan aspekton. — — —

Al la sukceso ne malplej kontribuis la grandioze bela vetero. Neimageblan bonŝancon tiurilate havis la aranĝintoj kaj same do ankaŭ la gastoj. Sed por la gastigantoj multo dependis ĝuste de tio. Stokholmo neniam estas tiel bela kiel en sunbrila tago, neniam tiel alloga kiel en serena somera nokto. Tion ŝajne sentis la gastoj, ĉar kiam ajn en la nokto oni trairis la urbon, ĉiam oni renkontis gesamideanojn, kiuj sencele vagadis kaj ĝuis de la favora vetero.

LKK-ano, kiu frumatene laca kaj elĉerpita iris hejmen por kelkhora dormo, ĉe la "Strömmen" vidis kongresanon, kiu mediteme staris kaj rigardis al la supraĵo de la rivero, kie en la magia lumo de la steloj brilbrilis la akvoj kaŭze

de la moviĝoj de la milionnombraj fiŝetoj. Ekkomencis interparolo, kaj la eksterlandano klarigas: "Tiel laca korpe mi estas, ke nun mi devus kuŝi en mia lito, sed neeble estas al mi tio. Kiaj belaj tagoj estis, kaj la noktoj . . ., kiajn noktojn vi havas . . .!"

Imagu, se estus estinta pluva semajno' — — —

Al jam dekomence bona impresio certe kunhelpis la riĉe flagornamita placo antaŭ la Centra stacio, kie flirtis grandaj svedaj kaj esperantaj flagoj, kaj la Norda ponto antaŭ la kongresejo, kiu estis flankigita de amaso da flagoj diversnaciaj; al neniu en la kongreso reprezentata nacio mankis la nacia simbolo. Entute 30-o da flagoj en la ĉiutage freŝa vento flirtis kaj donis festan kaj solenan impreson.

La komplezo de la koncerna ŝtata est-raro al la kongreso disponigi la pompan Parla-mentojn kiel kongresejojn ankaŭ forte impresis al la gastoj. Por ni svedoj tiu aranĝo ankaŭ estis feliĉa, ĉar Norda ponto estas unu el la plej trafikataj punktoj de la ĉefurbo, kaj granda intereso por nia lingvo vekigis ĉe la preterirantaj urbanoj.

En antikva sed tamen moderna stilo konstruita Koncerta domo, kie okazis tri el la kongresaj ĉefaranĝoj, altiris al si specialan ravon, kaj speciale la pompa granda salono imponis. — — —

### La unua tago,

de la LKK-anoj kaj iliaj multaj kunhel-pantoj atendita kun streĉaj nervoj, trovis la kongresan oficistarmeon jam frumatene preta por akcepto. Kaj ne longe, antaŭ ol svarme venis la gastoj por ricevi siajn kongresajn dokumentojn. Kaj ju pli pasas la tago, des pli ili amasiĝas antaŭ la dokumentabloj. Bedaŭrinde nur ke la alie sufiĉe granda galerio ne estis sufiĉa dum tiu ĉi unua tago. Sed iom post iom ĉiuj tamen ricevis sian dokumentaron. Kaj baldaŭ la svarmoj estis videblaj multloke en la urbo, plenaj de eltrova fervoro.

La vespero trovas ilin ĉiujn antaŭ la Koncerta domo por oficialigi la unuan tagon.

BEn.

## Parizo — Kolonjo — Stokholmo!

### Ĉu nun paco?

Grava ŝanĝo en la gvido de la esperanta movado, tion oni devas konstati post la Stokholma kongreso. Ĉu por bono aŭ malbono? Ĉu stagno aŭ saniĝo? Ke ne estis bona la stato ĝisnuna en la internaj rondoj, tio ankaŭ konstatita. Kie la mankoj kaj kie la kulpo? Jam ne tempo por tiaj pritraktoj. Nun, nur al la estonto ni rigardu!

Bedaŭras multaj, ke ne plu en la pinto de nia movado staras la ĝisnuna merituloj Stettler, Jakob, Karsch. . . . Honoron al ili — al ili nia movado ŝuldas multan dankon, ilia multjara sindona laboro por la bono de la lingvo Esperanto estas kaj estos multtaksata.


Sed saman sorton ili spertis kiel faris multaj aliaj. Sveda proverbo diras: "Novaj balailoj plej bone balas". Kaj tio natura estas. La homa naturo volas ĉiam ion novan, ian ŝanĝon. Kaj rilate al la novaj "balailoj", la novaj estraranoj de UEA, la bona kvalito de ili estas certa:

Bastien unu el la plej fidelaj, spertaj, agemaj malnovaj esperantistoj; Isbrücker kiu ĉiam havas la ĝustan vorton en la ĝusta momento; Malmgren relativa novulo en la internacia movado, sed kun milo da projektoj en sia kapo; Orengo, praktika viro, elokventa oratoro; Steiner, estro de la Esperanta Muzeo, konvinkiga kapablo, lasas neniam kion li iam kaptis; Kamaryt kaj Vogt, bonkonataj kaj same bonkapablaj.

Jen la novaj viroj! Jen ili, al kiuj la hodiaŭa esperantomovado havas sian konfidon! Facilan taskon ili ne havas, kaj pri tio ili mem bone scias. Des pli ni ŝuldas dankon al ili, ke ili sen tro longa hezito surprenis al si la respondplenan kaj pezan laboron, multofte sendanka.

Ĉu sukcesos? Se ni ne kredus al tio, tiuj ĉi linioj ne estus skribitaj. Do, ok al kreo de nova epoko en la esperanta movado! La komenco dum la XXVI-a estis promesa. La novaj gvidantoj bezonas ĉies subtenon. Ili ricevos ĝin!

BEn.



*La kongresa generalo inspektas siajn trupojn.*

## “La malferma”.

### **Varmaj koroj en varmega salono.**

Unue kaj laste ni devas konstati ke laŭ nia opinio la malferma kunsido farigis tro longa. Ke en tia belega vespero, en tia varmo esti devigata dum proksimume 3 horoj aŭskulti al multegaj kaj longaj paroladoj, multnombraj sed feliĉe mallongaj salutparoloj, belega sveda sed (pardonu »Tramista«!) longa muziko — tio estis la neenviinda sorto de la gastoj la unuan tagon.

Kaj tamen — kion forpreni? Ĉu la afablajn kaj korvarmigajn salutajn vortojn de la urba reprezentanto, ĉefguberniestro Nothin; ĉu la multloke duonŝercan bonvensaluton de s-ro Sam

Jansson, en alloga maniero tipa por ĉies nia »la Rektoro«; ĉu la elokventan respondparolon de la prezidanto de UEA, s-ro Ed. Stettler; ĉu la grandan sensacion de la Malfermo: la antaŭ kelkaj jaroj ĉiam alsopiritan tradician festparoladon de la plej fama Esperanto-ortoro, D-ro Edmond Privat, Genevo, al kies elokventeco oni nun denove aŭskultis kun streĉa atento pere de la telefonaj fadenoj inter Stockholm kaj Lausanne; ĉu la mallongajn sed multajn salutojn de la landaj reprezentantoj tiel interesajn pro la diversa multlingveco; ĉu, ĉu ....?


Nenio forprenebla! Do en laca streĉeco la 30-nacia dankema kaj aplaŭdema publiko restis ĝis la fino. Kaj jen ni komencas de la komenco. — — —

Jam kelka tempo antaŭ la fiksita tempo la granda salono de Koncerta domo estis plenplena. Precize ĝi sufiĉas por la grandnombra ĉeestantaro. Sur la podio oni vidas la honorajn gastojn, reprezentantojn de la registaroj, de la invitinta asocio, Sveda Trafikasocio, de gravaj simpatiantaj organizoj kaj de landoj diversaj. »La kongresreĝino de Kolonjo«, s-ino Manjo Gernsbacher, aperas sur la podion kaj ricevas grandan aplaŭdon.

Muzika numero de la Tramista orkestro. »La Malferma« komenciĝis. Multloke en la salono la bela muziko ne estis aŭdebla pro bruo kaj babilado. (Ĉar gastiganto ordinare ne povas mem riproĉi al siaj gastoj, ni aliloke en tiu ĉi numero redonas pri tio diraĵon de unu el la gastoj mem.)

S-ino Gernsbacher kiel vicprezidantino de la Kolonja Kongreso salutas la Stokholman kongreson kaj proponas la kongresan estraron.

Hon. prezidanto: rektoro Jansson; prezidanto: poŝtestro Julin; vicprezidantoj: s-roj Dahl, Steiner, D-ro Kempeneers, Robertsson, D-ro Pitlik, Carlsberg, f-ino Spiess, s-ino Helmi Dresen, s-roj Setälä,



*Internacia parado: Nylén, svedo; Steiner, aŭstro; Jansson, svedo; rusino; itala monaĥo.*



*La esperanta simbolo ĵetas sian omb-  
bron antaŭ si . . . .*

generalo Bastien, ing. Walther, D-ro Loyola, Cabesa, s-ino De Szabó, s-roj Canuto, Libers, Kazlauskas, Baas, Bugge-Paulsen, Bujwid, Morariu; konstanta ĝenerala sekretario: s-ro Kreuz; ĝenerala sekretario: s-ro Malmgren; vicsekretario: s-ro Söderberg.

### **Afablaj vortoj de la urba reprezentanto.**

Rektoro Jansson, salutata per aplaŭdo, dankas kaj poste prezidas la kunsidon. Li donas la parolon al la ĉefguberniestro de Stokholmo, s-ro Torsten Nothin, kiu konstatas la gravan kulturrolon, kiun havas la esperanta movado.

Li daŭrigis:

La kongreso kolektiĝis dum serioza tempo, karakterizita de necerteco.

Ankoraŭ la popoloj suferas pro la sekvoj de la plej ampleksa senlaboreco, kiun la historio konas.

La ekonomiaj rilatoj inter la nacioj tre malfaciliĝis. Kaj en la ŝtatoj la opinioj pri sociaj kaj politikaj aferoj staras unu kontraŭ la alia kiel neniam antaŭe.

Kien la evoluo nin kondukos, ni ne povas vidi. Por multaj la tempo estas

tiel malfacile komprenebla, ke ili finis sin interesi pri komunaj idealaj laboroj.

Mallonge dirite, ili rezignis.

Sed feliĉe ankaŭ troviĝas homoj, kiuj ne volas forlasi la senegoisman batalon por pli bona kaj pli luma tempo, kiun generacio post generacio partoprenis. Ili ne turnas sin for de la celo, kiu enhavas pli grandan sekurecon por la individuoj, pli grandan komprenon inter la popoloj kaj fine pacon sekuran inter ili.

Eĉ se tiu celo interfoje ŝajnas malproksima, la momentaj malsukcesoj ne detruas ilian esperon aŭ kapablos malmumigi la mensojn.

En multaj manieroj oni povas labori por la bono de la komuna antaŭeniro kaj interkompreno.

Fido al la estonteco kaj konscia kaj racia vido al la okazantaĵoj eble estas la plej bona, ĉar per tio la danĝera paniko estas malhelpata kapti la homojn kaj tenti ilin fari malsaĝaĵojn. Ĉiu komuna laboro por la bono de la homa kulturo estas paŝo en ĝusta direkto.

. Bona antaŭkondiĉo de bona evoluo estas ne nur, ke la homoj provas kompreni la reciprokan vidpunkton, sed ankaŭ ke ili povas pli facile interkompreniĝi.

Komprenante tion la esperantistoj volas faciligi la interŝanĝon de pensoj, skribe kaj parole. Tio estas la plej grava kondiĉo de pli intima kontakto inter la homoj. Sed mi supozas, ke ne nur la simpla konstruo de la lingvo kaj la facileco ĝin lerni estas la ĉefa motivo de Esperanto.

Per kreo de komuna lingvo oni volas trovi portanton de la komuneco, konfirmon de la egalrajto de la naciaj lingvoj, por ke neniu el ili estu subpremata de alia.

Ni, kiuj ne apartenas al la esperanta rondo, esprimas nian estimon por via senegoisma laboro por la kreo de pli grandaj eblecoj de interpopola kunlaboro.

Permesu al mi diri kelkajn vortojn speciale al la kongresanoj el aliaj landoj. Miaj samlandanoj esperas, kiel mi mem, ke vi, flanke de la komuna laboro, kiu igis vin veni tien ĉi, havu okazon ekkoni nian ĉefurbon kaj la svedan kulturon.

Ni tre ekĝojos, se vi fartos bone inter ni. Kaj ni esperas, ke vi kunportos hejmen multajn gajajn kaj belajn memo-



*La sudan fajron reprezentis la hispano Mangada Rosenörn.*

rojn, jes, tiel multajn kaj gajajn, ke ni havu la ĝojon ankoraŭfoje saluti vin bonvenaj inter ni.

Estu kore bonvenaj!

### **Bonvenigas "la Rektoro", ŝercas, seriozas kaj admonas.**

Jene:

Mi tre kore dankas al vi, Ĉefguberniestro, pro la bela saluto kaj precipe por la senrezerva rekono de nia laboro kaj varmaj bondeziroj por sukcesa laboro.

Mi same kore dankas al la honora komitato kaj proponas saluttelegramon al Princo Karlo Duko de Vestrogotio. Al la reprezentantoj de la sveda kaj aliaj registaroj, kiuj bonvolis per sia ĉeesto honorigi nian malferman kunvenon, mi ankaŭ diras koran dankon. Same al la multaj gravaj svedaj organizoj, kies reprezentantojn mi vidas inter ni. (Primemorigas poste la prezidanto la mortintajn grandulojn.)

Samideanoj! Karaj amikoj! Denove ni renkontiĝas sub la verdaj standardoj por nia ĉiujara granda festo, al kiu sopiras ĉiu nova kaj malnova esperantisto kiel geamantoj al renkonto. Mi ripetas kaj substrekas la saluton, kiun jam esprimis la guberniestro de nia urbo kaj kiu jam logis vin sur verdaj afiŝoj dum preskaŭ unu jaro:

Bonvenon, bonvenegon al bela Svedlando. Ke via restado inter ni estu ĉiel

kontentiga kaj ĝojoplena, tio estas nia varma deziro.

Ne ĉiam fremdlandanoj estis bonvenaj sur la bordo de la Melarlando. Interesos vin scii, ke tiu sama urbo, kiu nun per sia estro tiel varme salutis vin, tiu sama urbo estis fondita por ŝtopi la enirejon al Melaren, por defendi nin kontraŭ la vizitantoj, kiuj venis por vidi nian belan, bonan landon. Sed ilia celo estis iom alia ol la via. Ili venis ne nur por vidi la belaĵojn sed por forporti kiel eble plej multe de la bonaĵo, kaj iel malpraktike ili forbrulis kion ili ne povis forporti. Jen la kaŭzo ke ni estis tiutempe malpli gastamaj ol nun.

Sed mi devas diri, ke niaj gastoj de tiu tempo lernis tiun turistan metodon de niaj prapatroj la vikingoj, fame konataj pro sia granda intereso al la kulturo de landoj pli favorataj de la Naturo. Ankaŭ ili turistis per ŝipoj al diversaj landoj kaj sukcesis sen multe da mono akiri unue manĝon kaj vinon por la longa vintro, due kaj pli daŭran havaĵon, belajn artajn objektojn, kaj trie kaj plej grave la altan kulturon de la sudaj landoj. Tiel ni svedoj kutimiĝis turni nian atenton kaj intereson al la kultura programo de la sudo kaj iom post iom per malpli akraj metodoj importi la produktojn.

En ĉiu lando, najbara kaj fora, ni pruntis, savis aŭ aĉetis ideojn kaj modelojn tiel kaj miksis ilin kun niaj propraj laŭ nia speciala maniero kaj faris tiamaniere kion ni nomas la altan svedan kulturon, pri kiu ni fieras almenaŭ post la vizito de iu afabla fremdulo.

Nuntempe ni ĝojas la viziton de alilandanoj, eĉ reklamas por ke ili venu. Ni klopodas por lerni la lingvojn de la grandaj nacioj, kaj rekompence la hoteloj ricevas gastojn de tiuj landoj. Sed de la aliaj ne multaj venas, ĉar ili timas nekomprenon.

Fine tamen de la lasta jarcento ni akiris novan ideon de najbara lando, la pola lando, kiu iom post iom ŝanĝos tiun staton, tiel ke ni povos komprene akcepti homojn el ĉiuj nacioj, se ili volas dediĉi nur kelkajn semajnojn al la studo de bela, facila, fleksebla lingvo internacia. Tio estas invento, kiu devas plaĉi al ĉiuj kaj plej al t. n. malgrandaj nacioj, kies lingvojn oni nur malofte studas eksterlande. Vi scias, ke tiu ideo jam frue fortiĝis en nia lando tiom ke niaj pioniroj eĉ ricevis tiun honorigan komision,

redakti kaj eldoni la ligilon inter la tiamaj esperantistoj, nome la internacian gazeton. Ni havas la ĝojon vidi tie ĉi la du redaktorojn: Paul Nylén, nian honoran prezidanton, kaj la D-ron Waldemar Langlet, kiu prelegos en la Somera Universitato. Kun ĝojo mi konstatas, ke ili restis fidelaj al la ideo de nia majstro. Dum favoraj ventoj kaj kontraŭaj, kun bona kaj malbona famo, ili batalis por nia lingvo, ĝis ĝi atingis la nunan pozicion de sekuro kaj preskaŭ ĝeneralista estimo.

La lastaj sep jaroj montras mirinde grandan progreson. La Eldona Societo sub lerta gvidado preparis la teron por la semo de Andreo Ĉe kaj aliaj famaj instruistoj. Grandare la homoj aliĝis al la kursoj. Unue pro scivolo, due pro distremo, trie pro bezono. Pli kaj pli grandskale la kursanoj restis anoj de la movado. Pli kaj pli altiĝis la nivelo de la esperantistoj, ĝis ni povis riski inviti universalan kongreson. Ne miru, ke ni longe hezitis. Ni tre forte sentis la respondecon antaŭ vi kaj la movado. Kaj ni timis la staton de nia valuto. Nia lasta vikingo Kreuger tamen aranĝis la aferon tiel bone, ke vi nun eĉ gajnos. Do vi povos eĉ gajni monon per longa restado en nia lando. Do bonvolu resti longe. Nia atendo do ne estis vana. Ni vidas kiel niajn gastojn eĉ pli grandan aron ol ni reve esperis. Kaj la sveda atmosfero estas nun milda, eĉ varma al la fremdaj verduloj. Vi trovos, karaj niaj gastoj, malfermitajn korojn, se vi uzas la mirindan ŝlosilon, kiun ame ellaboris nia majstro. Uzu ĝin lerte kaj iom paciencie, ĉar mi vidas inter nia kolegaro grandan nombron de novaj vizaĝoj. Ne imagu, ke tuj vi aŭdos elokventan torenton el la buŝoj de tiuj novuloj. Parolu klare kaj ne tro rapide, kaj vi vidos la belan floron de interkompreno malfermi sian ruĝan kalikon kiel signon de amo al la lingvo kaj al la ideo, kiun ĝi portas. En nia norda klimato ni bezonas iom da tempo por degeli, sed des pli freŝaj estos la floroj. Ni rekomendas al vi legi unu poemon en la ĵus aperinta Sveda Antologio, nome "La Popolo de Nifelhem", kaj vi vidos tre klare, kiun fortan sopiron al vasta kompreno kaŝas sin sub nia ŝajna rigideco. Kun iom da pacienco vi povos facile rabi niajn korojn. Stokholmo ne plu defendos nin.

Oni ofte komparas multlingvajn kongresojn kun la nia. Sub lerta gvido kun

bona preparo, ankaŭ multlingva kongreso povas atingi rezultaton sufiĉe rapide. Sed kia estas la kunvivo interlabora. Mi konstatis, ĉe multaj kongresoj, ke oni prefere loĝas, manĝas, amuziĝas laŭnacie. Alie estas malfacila la interkompreno. Ĉiam se tri kvar nesamlingvanoj kunestas, ili sentas tiun ĝenon, ke iu tute ne aŭ malbone komprenas la lingvon de la alia. Tiel ne okazas dum nia kunestado. Ni ĉiuj komprenas unu la alian, kiel amiko amikon. Por la novuloj tiu fakto estas miraklo. Du petojn mi diras nun: ni laboru pace, en kompreno. Due: uzu lerte kaj prudente nian lingvon ĉie kaj ĉiam. Mi deziras fruktojn al tiu kongreso, kiu okazas en la signo de unu lingvo."

La kongresanoj entute nun kontribuas al la soleno: la Grabovskia verko unusone kantita:

*Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',  
la ombroj de noktoj forkuras el mond'.*

**Stokholmo, eleganta kiel Parizo,  
bonorda kiel Berlino,  
bela kiel Vieno....**

Parolas s-ro Ed. Stettler en la nomo de UEA, dankas al la invitintoj kaj en la nomo de la fremdlandaj esperantistoj li esprimas sentojn je ilia alveno: "Stokholmo, eleganta kiel Parizo, bonorda kiel Berlino, kaj bela kiel Vieno kaj Budapeŝto, — fiera Stokholmo, reĝino de la maro, estu salutata en la nomo de ni esperantistoj!" Li salutis la svedan registraron kaj la urban kaj dankas por la komplezo al la kongreso disponigi la eminentan konstruaĵon la Parlamentejo. Li akcentas ke la esperantistaj gastoj ja estas turistoj, sed ne turistoj kiel ordinaraj kiuj estas sklavoj de siaj propraj lingvoj, sed kiel unu popolo, komprenanta unu la alian. La Esperantomovado bone marŝas, la mondo ekkomencis malfidi la diplomatojn kaj utiligi la metodojn de la esperantistaro. Necesas tamen ke la esperantistoj mem multe pli interesiĝu pri la internacia funkciado de la esperantomovado. — Trankvile kaj persiste ni laboru. Vivu Esperanto, vivu la gastama Svedujo!

Poste parolis la diplomaciaj reprezentantoj (deko), kaj f-ino Lidja Zamenhof en forte aplaŭdita saluto admonis al fido al la estonteco.



## Unikajo: radioelsendo. Raportu!

Je la unua fojo en la historio de Esperanto nun okazis ke esperantokongreso pere de la radiaj ondoj estis partoprenebla ankaŭ por neĉeestantoj. Certe multaj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne havis okazon partopreni la kongreson, uzis la maloftajon aŭskulti la kongresan malfermon, kaj interese estus aŭdi pri la rezulto, ne nur por ni esperantistoj sed certe ankaŭ al la sveda »Radio-tjänst» interesas la afero. Raportu kaj danku!

»Halo-viro» estis la LKK-prezidanto, s-ro T. Julin, kaj al unu post la alia de la landaj reprezentantoj li donis la parolon. Tiuj en mallongaj paroloj salutis la kongreson, unue en sia nacia lingvo kaj poste en Esperanto. Interesa provkarto de diversaj nacilingvoj!

## Parolas Lausanne!

La plej atendita, atentita kaj interesa parto de la »Malferma» nedisputeble estis la radioparolado de d-ro Ed. Privat el la grandstacio Lausanne. Multaj el la kongresanoj jam antaŭ jaroj en multaj kongresoj aŭskultis al la granda vortsorcisto kaj oratoro kaj nun denove ĝojis aŭskulti al la elokventa parolanto, kiu ĉiam tiel mirige sukcesas kapti la sentojn kaj la koron de siaj aŭskultantoj. Same nun li kaptis. Spite al la multmejla distanco oni distingis klare ĉiujn vortojn de la parolanto, ĉiujn nuancojn oni tremkaptis. Sensacio ĝi estis, kaj jen ĝi:

## Karaj Kongresanoj!

Kun vi per la sento kaj momente ankaŭ per la voĉo mi plej kore salutas vin ĉiujn, el Genevo, la sidejo de l' Universala Esperanto Asocio.

Samtempe mi salutas tiun neforgeseblan Svedujon, kiu vin gastigas hodiaŭ, kaj la reĝinon de la nordaj urboj: Stockholm la belegan.

Nenie pli taŭge vi povus ja kunveni ol en tiu mirinda ĉefurbo de libera popolo, kiu fiere klopodas plialtigi kaj pli profundigi sian spiritan edukon dum ĝi progresigas la materian teknikon. Guste tiuj atingas la plej altan gradon de civilizo, kiuj scias konservi tian ekvilibron kaj ne permesi, ke la homaj eltrovaĵoj formangŭ la homon mem, sed male, ke ili submetiĝu kaj nur servu al lia feliĉo.

Kiu konas, ne nur la svedan industrion en la grandaj fabrikoj, sed ankaŭ la svedajn hejmojn kun la blukulaj patrinoj, teksantaj la doman ŝtofon apud la blonda bubo en lulilo, tiu sentas ke ilia nacio ja ŝatas la komforton de moderna civilizo kaj la oportunajojn de materia tekniko, sed ke ĝi ne vendus pro tio sian animon kaj sciis ankaŭ sen tio savi kaj daŭrigi sian intiman feliĉon.

Facile estas vidi kiom la svedoj respektas la homan dignecon sub ĉiuj laborvestoj kaj kiel ili konstante klopodas plibonigi sian ekonomian organizon por faciligi la vivon al ĉiuj familioj ne nur per la kooperativa fruktokorbo de la dommastrino, sed ankaŭ per la instruaj volumoj de la popola librejo kaj per la kajeroj de la vesperkursoj.



*Kun Kalewipoeg alvenis amase niaj estonaj amikoj.*

Inter la fremdaj lingvoj instruataj en tiuj kursoj, Esperanto jam de kelkaj jaroj atingis tre gravan lokon, eĉ ofte la unuan pro ĝia rilate granda facileco kaj reguleco. Per ĝi multaj svedoj lernis ekkoni iom de niaj diversaj kulturoj kaj rapide komprenis ĝuste tion, kio karakterizas la rolon de internacia helpa lingvo.

La grandaj nacilingvoj allogas la eksterulojn pro neceso profesia aŭ pro la deziro ekkoni tiujn potencajn kulturojn kiujn ili reprezentas. Sed kiel eksciis ankaŭ ion pri tiaj multaj nacioj, kies lingvo ne estas eksterlande tiom konata kaj lernata? Oni kutimas ilin nomi malgrandaj, sed iuj el ili estas tre grandaj, ekzemple la ĉina aŭ pola, kaj ili kune formas la plimulton de la homaro.

Svedujo estas ekzemplo de tre alta kulturo, kiun la homaro ne povus ignori sen grava perdo, valora por la komuna tuto. Necesa kordo por la kanto de la harpo! Nu, Esperanto ĝis nun tute nature kaj ĉiam pli videble servas kiel perilo kaj konigilo de tiaj kulturoj kaj trovis en ĉiuj tiaj nacioj kreskantan nombron de adeptoj. La plej talentaj el ili tradukis en la helpan lingvon la plej belajn verkojn de sia hejma literaturo. Floras ĉe la esperantistaro antologioj katalunaj, flandraj, polaj, hungaraj, kroataj kaj bonegaj tradukaĵoj el finna, estona, litova, bulgara, japana aŭ ĉina lingvoj.

Estis ĉiam specialaĵo de niaj universalaj kongresoj prezenti, ne nur impresan ekzemplon de internacia kunveno kun lingva unueco kaj egaleco, sed ankaŭ scivoleman pilgrimadon en la folkoron de tiu aŭ alia nacio, konservinta sian ĉarman tradicion kaj koloron en propraj kutimoj, en popolaro, en popolkantoj kaj vilaĝaj kostumoj.

Kiu ĉeestis plurajn esperanto-kongresojn, tiu povis konstati ĉiam la du regantajn entuziasmojn de la partoprenantoj, unuflanke la ĝojon senti sin egalaj en kompreno kaj en uzo de unu sola helplingvo, donanta al la kunveno la econ de familia renkonto for de ĉiu lingva baro, ĝeno, supereco aŭ malsupereco; kaj aliflanke la plezuron ekkoni pli proksime unu novan membron de la homa familio, unu plian popolon por ŝati kaj admiri, eĉ por ami en ĝia malkovrita intimeco kaj amika gastigado.

Tiu rimarkinda gusto pri naciaj kutimoj de ceteraj nacioj, tiu scivolemo pri

ilia vivo kaj popolaro ĉiam estis disvastigata per Esperanto samtempe kun la kompreno pri homara unueco kaj solidareco, tiu beninda sento, kiu nature kunflugas sur flugiloj de internacia lingvo.

Sed tiu sento pri unueco ĉiam sin ligis kun la ŝato al diverseco. Neniam ĝi similis al unuigo detrua kaj frostiga, kiu fortranĉus per maŝina falĉilo ĉiujn florojn de la kampo por atingi severe tonditan kaj unuforme razitan ebenajon.

Ĉar la internacia lingvo ĉiam fidele kreskis en sia rolo helpa, neniam anstataŭa, ĝi profitis el la trezoroj ĉie malfermitaj al ĝi, kiel profitas abeloj el la diversaj floroj por sia bonodora mieleo. Esperanto ne malriĉigis siajn lernintojn, sed riĉigas ilin per amika ŝlosilo por malfermi multajn korojn kaj kompreni la valoron de ĉiuj, eĉ plej malgrandaj, naciaj kulturoj, baraktantaj por la vivo.

En nia tempo, la nacioj emas aserti sian rajton kaj fieri pri la propra personeco kaj tradicio. Tio estas natura fenomeno post epoko de subigoj aŭ malĝalaĵoj. Nura danĝero estas, ke ĉiu nur aŭdu sin mem kaj ne komprenu, ke sama fiero kaj sama vivovoĉo estas egale naturaj ĉe la najbaro.

Aldoni la komprenan modon al la aserta modo, jen la speciala rolo kaj tradicio de la helpa lingvo, kreskinta sur la bazo semita antaŭ duoncentjaro de klarvida geniulo.

Kompreni la senton de la ceteraj, tio estas komenco de amikeco. Kiu spertis tion en egaleco lingva kaj facileco komunika tiu ekhavas por sia popolo pli altan ambicion ol nura fiereco pri si mem, li volos ke ĝi fariĝu io pli solida ol nacio timata, li volos, ke ĝi estu amata membro de la homara familio. Tion oni atingas ne per vanteco aŭ fanfaronado, sed per servigo de siaj propraj ecoj kaj valoroj al la bono kaj harmonio de la tuta familio.

Unueco en diverseco kaj diverseco en unueco, tio estas la spirito disvastigata de modesta lingvo kun modesta rolo, sed kun jam profunda sperto. Vivante sub ĝia stelo dum unu semajno, vi similas al homoj starantaj sur monto ĝuste sub blua spaceto de l'ĉielo aliloke kovrata per minacaj nuboj.

Foje la montaranoj supreniras eĉ pli alten kaj la maro de nuboj fermiĝas sub ili. Rigardante malantaŭen kaj mal-



*La du prezidantoj, la urba kaj la kongresa, konstatas la sukceson.*

supren, ili vidas sub si la grizan oceanon kaj ridas je ĝia minaco.

Morgaŭ vi ĉiuj reiros hejmen, kiel la montarano reiras malsupren en la valon kaj retroviĝas sub la griza ĉielo kun minacantaj nuboj. Tiam ne forgesu la spertojn de tiu ĉi semajno. Memoru ke super tondraj nuboj estas ebleco de blua ĉielo.

Fine la homoj faras mem grandparte sian sorton kaj blovigas mem la ventojn kiuj kovras aŭ purigas ilian ĉielon. Se vi spertis, ke la disvastiĝo de Esperanto kiel helpa lingvo blovigas freŝan kaj utilan venton de bonvolo kaj kompreno, tiam ebligu aliajn homojn partopreni la saman ĝojon kaj kune prepari la novan estontecon. Ne lasu vin subpremi de pezaj atmosferoj. Post malumo venas lumo, post ventego venas hela ĉielo. Post ĵaluzo venas klarigo. Post suspekto kunlaboro.

Vi plendas ke iaj sciencistoj laboras por pretigi plej modernajn ilojn de mortigo kaj detruo, sed vi mem ja posedas admirindan ilon de kompreno kaj konstruo. Konkurencu do la malbonon per

la bono kaj tenu la vivigan ilon eĉ pli preta ol la mortigaj. Vivu Esperanto, Kreanto de unueco kaj savanto de diverseco!

Post tio ni atingis la finon de la sufiĉe longa malfermo kaj la prezidanto per kelkaj vortoj finis la solenon, admonante al la kongresanoj ĉiam kaj ĉie uzi nian lingvon en la interrilato kun la svedoj, tiamaniere helpante al la svedaj esperantistoj antaŭenpuŝi nian ideon.

*BEn.*

## Kiel gasto de l'urbo.

La grandaj potencoj de la ĉielo kaj vetero montris sian plej favoran flankon tiun tagon, kiam okazis la oficiala akcepto en la fiera Stokholma urbdomo. La suno brilis kiel neniam antaŭe, la blovo precize sufiĉe spiris por krispiĝi la akvojn, tiel donante la ĝustan reliefon de movo — kaj kaŭze de tio ĉie brilaj, ĝojaj, kontentaj vizaĝoj, ĉie esprimoj de miro kaj ravo. La horoj en la majeste bela urbdomo atestite la plej impresplenaj dum la tuta kongreso.

La ekstero de la urba domo la gastojn jam de la komenco imponis, kaj eĉ pli imponitaj ili fariĝis starante sur la interna korto, ne nur pri la bela konstruaĵo sed precipe pri la okulfrapante gradega gastamo, kiun montris al siaj gastoj la urbo. Longegaj vicoj de tabloj plenplenaj de apetitigaj sandviĉoj multdiversaj, tortoj kaj kukoj, aliaj kun amasoj da tasoj por kafo kaj teo, kaj denove aliaj por biero aŭ aliaj refreŝaj trinkaĵoj.

Kaj kredu, ke ne mankis la apetito! Grandioza ĝi estas. Kaj kiu ne havus apetiton antaŭ tiaj montoj da bongustaĵoj. Neniam antaŭe ni vidis iun, kies gustumaj organoj ŝatas samtempe enbuŝigon de dolĉa torto kaj — biero, sed eĉ tion oni nun vidis. Post la manĝo oni sidiĝis kie ajn kie sidebla loko trov-



*Ĉiam antaŭ la Parlamentejo tiel ...*

iĝas, kaj eĉ bonan cigaredon, tiel bongusta post bongusta manĝo, oni ne bezonis preni el propra provizo: ĝentilaj servistoj kun grandaj skatoloj da cigaredoj rondiris inter la nun sataj gastoj, ĉie akceptataj kun granda kontento.

Kaj la parolo de la prezidanto de la urba konsilantaro, s-ro K. Tengdahl, elkora, simpatia kaj kontentige mallonga, vekis sentojn de reciprokeco inter la oratoro kaj publiko. La tondra aplaŭdo, kiu sekvis post la bonega traduko (majstre farita de la kongresa »laŭtigilo» s-ro Einar Dahl) atestis tion, kaj la prez. de UEA s-ro E. Stettler ankaŭ trovis, kiel ĉiam, la ĝustajn vortojn en sia responda parolo.

La montrado de la interno de la urba domo impresis al la gastoj, kaj ofte oni aŭdis la demandan konjekton: »Vi svedoj devas esti riĉa popolo!» Kaj ni svedoj sentis nin riĉaj kaj tre afablaj! Kia tago, kia tago . . . . .!

*BE n.*

## Kongresa belarto.

Ofte oni aŭdas, ke esperanta mondkongreso unuavice estas turisma evento, kaj sendube plejmulte da kongresanoj preferas praktike eluzi sian lingvoscion por ekkoni fremdan landon, ĝiajn popolon, naturon kaj kulturon, ol ĉeesti kunvenojn aŭ aŭskulti prelegojn. Eble la 26-a tiurilate estis escepto, ĉar laborkunsidoj, somera universitato kaj fakkunvenoj ĉiutage havis plennombran aŭskultantaron, kaj je la solena fermo, kiun ordinarre partoprenis nur kelkdeko da kongresanoj, la sufiĉe granda salono estis de planko ĝis plafono plenplena. Sed kompreneble ankoraŭ pli popularaj estis la ekskursoj — komunaj aŭ privataj — al la alloga ĉirkaŭaĵo kaj same ankaŭ la ceteraj amuzaj aranĝoj diversspecaj.

Inda finc de brila kongresa dimanĉo fariĝis la

### Koncerto

de la dalekarlia ĥoraro (Siljansbygdens körförbund), kies preskaŭ ducent membroj faris la longan veturon de sia provinco al la ĉefurbo speciale por prezenti al la kongresanoj sian arton kaj montri,

kiel kulturite povas kanti simplaj svedaj kamparanoj. Jam la pompa salonego de la Koncerta Domo kun ĝia kolonara podio, bele ornamita per trideko da esperantaj kaj svedaj flagoj, kreis en la kongresanaro festan animstaton, kiun nur plie altigis la apero de la ĥoraro, pitoreske vestita en multkoloraj naciaj kostumoj. Direktis la fama komponisto d-ro *Hugo Alfvén*, kiu majstre estris ĉiun voĉon kaj per sia elektriga gvidado entuziasmigis la ĥoraron kaj pere de ĝi la tutan dumilan ĉeestantaron.

Specialan mencion meritas la bonega esperanta elparolo, kiun akiris la kantistoj, kvankam la plimulto ne scipovas la lingvon kaj nur havis okazon dum mallonga tempo studi la esperantajn tekstojn, kiujn ili tamen grandparte parkere sciis.

Karakterizan, unuarangan elekton el la sveda kantrezoro donis la koncerto, kristale klare kaj melodie belsonis la voĉoj, antaŭ ĉio tiu de la solistino, *Hanser Lina Göransson*, kiu vere ravis ĉiujn kaj nur post bisajo sukcesis silentigi la tondrajn aplaŭdojn. Lasta programero estis la impona kantato "Gustav Vasa", aranĝita de la direktisto mem por solistoj, miksita ĥoro kaj orgeno kaj senmankete prezentita en ĝia tuta majesteco. Fine la ĥoraro dankis pro la ovacioj, la floroj al la solistino kaj la laŭra krono al d-ro Alfvén per ekstra numero, nome "La Espero", kiun plenanime kunkantis ĉiu kongresano. Nova, bone meritita sukceso por la ambicia ĥoraro kaj ĝia direktisto!

Unikaj okazaĵoj dum la kongreso ankaŭ estis la du

### Teatraj prezentadoj

en Oscarsteatern. La programo inkludis du unuaktajn komediojn: "Ludi per fajro" de la sveda dramisto August Strindberg kaj la klasika "Edziĝo deviga" de Molière. Sub la lerta gvidado de la juna reĝisoro *Sandro Malmquist* la geaktoroj dum okmonata preparo tiel zorgeme laboris, ke ĉiu detalo de la prezentadoj estis altkvalita. Ne nur el lingva vidpunkto aŭ kiel amuzaĵo sed ankaŭ kiel artaj produktaĵoj tiuj vesperoj havis grandan intereson, kiel cetere jam atestis la profesiaj recenzistoj. En la unua komedio oni tuj rekonis la tipe Strindbergan dramarton kun akraj, rapidaj replikoj, kiel fulmoj zigzagantaj tra la sufoke varmega ĉambro, kaj oni konstatis,

ke ankaŭ en la esperanta vesto la drama viveco kaj la senpardona realismo ne niel perdiĝis. — Bedaŭrinde ne estis eble por tiu sola okazo elekti pli longan kaj samtempe dramece pli efikan teatraĵon el la riĉenhava verkaro de Strindberg, sed dank' al la bonega ludo eĉ tiu malgranda provaĵo troviĝis sufiĉe reprezentata. Tiel bone ĉiu ludanto plenumis sian taskon, ke nur la variaj grandecoj de la roloj rajtigas al ni speciale mencii la nomojn de *Eva Malmquist*, *Karl-Arne Holmsten* kaj *Börje Mellvig*.

Tute alia ja estas la karaktero de "Edziĝo deviga", kies multajn komikajn situaciojn la reĝisoro senescepte bone eluzis. Per lia prilaboro tiu sprita ŝerco pri la ne tro juna fraŭlo Sganarelle, kiu komence ardas de deziro edziĝi al la bela Dorimène sed baldaŭ ektrovas ŝiajn egoismajn intencojn kaj nur kontraŭvole kaj perforte fariĝas ŝia edzo, aperis kiel treege ridiga burleskaĵo, en kiu la rolantoj havis bonan okazon malbridi siajn komediajn talentojn. Ankaŭ la sceneja enkadriĝo bonege kunrespondis al la enhavo kaj kontribuis al la forta efiko de la prezentado. La ĉefrolon brile ludis *Georg Fernquist*, kaj ĉirkaŭ li grupiĝis unuavice la jam menciitaj geaktoroj de la Strindberg-a komedio. Aplauĉoj ofte interrompis la ludadon, kaj je la fino la ludantoj estis ovacie honorataj, la reĝisoro inter alie per giganta laŭra krono.

Ĉiuj gravaj stockholmaj gazetoj tre favore raportis pri la prezentadoj. Ekz. konata ĵurnalisto, kiu ne posedas nian lingvon kaj pri la teksto sekve nur povis juĝi laŭ la nuraj sonfektoj, en tre laŭdanta recenzo inter alie skribis, ke "miregige estis konstati kiel bele esperanto sonis de la scenejo. Verŝajne ĝi ne nur estas kongreslingvo sed ankaŭ lingvo per kiu oni povas konversacii, ami kaj malami." Kaj menciinte la fakton, ke la geaktoroj estas junaj disĉiploj el la teatra lernejo de Malmquist, kiuj antaŭe ne ludis grandajn rolojn, li faras la interesan rimarkon, ke estas feliĉe por teatraj lernejoj ludi en fremda lingvo, ĉar tio devigas la ludantojn pripensi la elparolon. Kaj pri unu el la junuloj li aldonas, ke dank' al la lingvo mem lia ludo ekhavis intensecon, kiu preskaŭ donis impreson de teatra evento. Tiu atesto de senpartia kompetentulo pri la uzebleco de esperanto kiel sceneja lingvo ne malgrandigas la individuajn

kontribuojn de la ludantoj al la granda sukceso.

Post la jaŭda tuttaga kongresekskurso al Upsala sekvis vespera ekskurso al la esperantaj literaturo kaj belarto dum la

## Vespero de literaturo, arto kaj bonhumoro.

Ke almenaŭ la bonhumoro ricevus sian parton, tion garantiis la nomo de *Einar Dahl*, kiu funkciis kiel programanoncanto kaj same populare kaj laŭtvoĉe kiel ĉiam enkondukis la kontribuantojn. Helpe de sia aktora talento — ŝajne denaska sed ĵus denove ekzercita dum dunokta laboro pri la unua granda esperantofilmo li faris tre komikan eniron kiel timeme tremanta nervozulo. Sed iom post iom li retrovis sian ordinaran sinregadon kaj elegante gvidis la publikon tra la esperantoliteratura ĝardeno, kies diversajn kreskaĵojn (legu: verkistojn) li lerte ekzamenis kaj prezentis sur la ekrano.

El la cetera programo estas malfacile elekti iujn punktojn speciale indajn je laŭdo, ĉar ĉiu artisto per sia kontribuo tute malarmis ĉiun eventualan kritikemulon. Do sufiĉu, ke ni mallonge mencias belegan violonludon de *Ernst Källberg*, unuaklasan kantadon de *Olle Björling*, kiu prezentis bukedon de diversnaciaj popolkantoj, kaj de *Folke Jansson*, kiu belsone interpretis svedajn kantojn, krome deklamadon de *Margit Gustavsson* kaj *Eva Nennert*, kiu lasta inter alie legis poezian prologon, verkitan por la kongreso de d-ro Fr. Szilágyi, kaj fine eksterordinare inteligentan fortepianan akompanadon de *Dorkas Norre*.

Kiel tutimpreso ni ne hezitas diri, ke kantado kaj muziko estis plej altkvalitaj, kaj rilate al la muzikaĵoj elektitaj kaj al la prezentado. Nur se ni kun intenca kritikemo serĉas atakpunkton, ni devas bedaŭri, ke la pure literatura parto de la programo ne estis sufiĉe reprezentata. Certe ne estas tro malfacile trovi kaj verkistojn kaj literaturaĵojn vere indajn je prezentado al internacia kongresanaro. Tamen tiu kritikero perdiĝas en la ĝenerala laŭdo, kiun meritas la kunlaborantoj, ĉar same kiel aliaj kongresamuzaĵoj ankaŭ tiu vespero, dediĉita al muziko kaj literaturo, fariĝis grandvalora kaj bela memoro de la 26-a en Stokholmo.

Koso.

## Prologo de la literatura vespero.

De F. Szilögyi

*Jen la tempo: mil naŭcent tridek kvar.  
El la nigro de l' palpa pasinto,  
el la bola kaldrono: Estant'  
siblas flama serpento; instinkto  
nia blindas, ni ĝemas, en infera fand'.  
al l' animo ŝutiĝas la sango. Kaj knar'  
de l' rustruĝa jarmila pordego ....*

*Krio, siblo, plorego, teruro kaj knar' ..  
Scenejo: la mondo*

*kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

— — — — —  
*Kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

*Nian koron belaman fortretas ferhufoj  
de la apokalipso; ŝirigo kaj kri',  
lupoj blekas kaj ploras la gufoj.*

*Ĉu Bel' vi mortus de New-York ĝis  
Aŭstralazi'?*

*En amara mizero mi homo nur ploras,  
neniu parolas ....*

*Bato, klako, tamburo, turmento, fanfar'  
Scenejo: la mondo,*

*kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar*

— — — — —  
*Kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

*Mil naŭcent tridek kvar ....*

*Ho sonĝo, vi mola,*

*vi milda orfino,*

*de l' sorĉa sordino,*

*per mano primola*

*el mondo ĉi bola*

*min gvidu! ....*

*Sonĝsipo naĝadas sur maro mildiĝa,  
nin lulas la ondoj al lando feliĉa;  
norda, sorĉa klar',  
mildas jam la mar'  
kaj la tempo — jes — mil naŭcent tri-  
dek kvar,*

— — — — —  
*kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

*Kaj sonĝvagonaro en rev', duonsven'  
nin lulas al lando de l' paco kaj ben',  
al lando de l' homoj, al lando de l' floroj,  
el tero de l' ploroj al lando de l' koroj,  
al lando, kie nun la bono radias,  
kie la bonvolo miraklojn magias,  
al lando de l' noblo, al land' de l' plezur'  
el tero de l' noktoj, el ter' de l' terur'.*

*En nia sonĝlando ne ploras la gufoj,  
sur homa korsango ne tretas ferhufoj,  
en nia sonĝlando la orf' ne timegas,  
en nia sonĝlando la pugno ne regas,  
kanono ne blekas, ne siblas la gaso,  
ĉielo ridetas al rida amaso,  
okuloj okulojn, animon esploras,  
en nia sonĝlando la homo parolas:*

*.... en la mondon venis nova sento,  
tra la mondo iras forta voko,  
per flugiloj de facila vento,  
nun de loko flugu ĝi al loko ....*

*Alvenis ni jam, haltas la sonĝvagonar'.  
Stacio: Stockholm —*

*Kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

— — — — —  
*Kaj la tempo: mil naŭcent tridek kvar.*

## Diras Heroldo de Esperanto

pri la muziko dum la Malfermo:

Belega estas tiu ĉi muziko. Sed la esperantistaro ŝajne na havas specialan ŝaton por muziko. Oni povus pensi, ke ĝi volonte eksilentas kaj kun plezuro kaj atento aŭskultas la belajn melodiojn. Sed la karaj gesamideanoj tuj, kiam la muziko eksonas, nur plilaŭtigas sian voĉon. Anstataŭ silentado, la antaŭa murmurado fariĝas uragano, kaj la bonega orkestro ludas por la muroj. Se vere vi ne ŝatas la muzikon, ni rajtas tamen peti iom da ĝentila atentado kaj iom da memdisciplino de vi, karaj gesamideanoj, ĉe estontaj okazoj.

— — — Denove ludas la orkestro belajn specimenojn de la sveda muziko, kaj denove la aŭskultantoj (?) preferas interbabili anstataŭ ĝui.

## “La nekonata esperantisto.”

En sia dankparolado dum la ferma kunsido generalo Bastien diris i. a. la jenajn pravajn vortojn:

”Sed ni ne forgesu ankaŭ alian homon, al kiu ni ŝuldas multe. Oni multe parolas pri eminentuloj. Ni pensu al tiuj multegaj esperantistoj, kiuj senlace laboras en urbetoj, en profesiaj rondoj — kies nomojn oni ne konas, kiujn oni ne renkontas en la kongresoj, ĉar ili ne estas sufiĉe riĉaj por kongresvizito. Ni salutitu la nekonatan esperantiston!”

La publiko responde sin levis kaj brua aplaŭdo montris ke s-ro Bastien bone scias kiel preni sian publikon.

## Red. Paul Nylén, Stokholmo

estas elektita kiel honora membro de UEA.



*Ankaŭ la energia filmisto Jean Forge havas tempon por ĝoji.*

## Nova gvido de UEA

Kiel oni povis atendi, la provizora aranĝo, konata kiel la interkonsento de Kolonjo, post multaj kaj longaj diskutoj akceptita de la pasintjara kongreso, ne definitive reguligis la organizan problemon, sed jam prezentigis novaj problemoj por solvi.

Pro la nepreteco de la nova organizo ankaŭ stariĝis kelkaj malfacilaĵoj. Entute la aliĝo de la landaj asocioj al UEA bone marŝis, sed ankoraŭ kelkaj restas. La germana asocio ekzemple, pro konataj kaŭzoj, ĝis nun ne povis decidi pri aliĝo. La itala asocio ne aliĝis antaŭ la kongreso, sed jam dum la unua kunsido de la Centra Komitato la afero estis aranĝata.

Dum la kongresanoj ĝenerale ĝuis la bonajn festajn aranĝojn de la kongreso, la anoj de la Centra Komitato havis laborplenajn tagojn. Jam la kompletiga elekto de komitatanoj prezentis malfacilaĵojn. Pro la rezulto de la unua

## La nova estraro de UEA


*Prezidanto:* s-ro generalo Bastien;  
*Vicprezidanto:* s-ro ing. Isbrücker;  
*Membroj:* s-ro prof. Kamaryt;  
 s-ro Malmgren;  
 s-ro ing. d-ro Orengo;  
 s-ro reg.-kons. Steiner;  
 s-ro d-ro Vogt.

voĉdonado s-ro Stettler, la ĝisnuna prezidanto de UEA, deklaris sian volon retiriĝi de sia posteno, kaj same direktoro Jakob. Tiu deklaro, emfaze prezentita al la komuna laborkunsido de UEA, kiu okazis en la granda salono de la sveda parlamentejo, vekis grandan sensation inter la multnombra publiko, kaj la plua traktado dum kelkaj minutoj neebliĝis. Fine oni tamen, ĉefe pro kelkaj kvietigaj vortoj de s-ro Isbrücker, sukcesis tiom trankviligi la kongresanojn, ke oni povis decidi pri prokrasto de la kunsido ĝis la tago posta, por doni al la komitato okazon diskuti la novan situacion.

Post longaj, intensaj diskutoj la Komitato en nova komuna kunsido la 8 aŭg. prezentis la rezulton. S-ro Stettler, post kelkaj ŝanĝoj en la komitato, je kelkaj specialaj kondiĉoj deklaris sin preta resti, sed montriĝis, ke tiuj kondiĉoj ne plenumiĝis kaj li konfirmis sian decidon ekŝiĝi. Tiu anonco denove vekis grandan emocion kaj fortajn protestojn.

Kiel prezidanton anstataŭ s-ro Stettler la komitato unuanime elektis Generalon Bastien, Parizo, kaj kiel vicprezidanton s-ron Isbrücker, Hago. La komitato unue proponis al s-ro Merchant, Sheffield, la prezidantecon, sed tiu telegrafe informis, ke li ne volas akcepti ĝin.

S-ro Bastien en mallonga parolado klarigis la situacion kaj speciale atenti-



*Fotografado, ĉiam kaj ĉie . . . .*

gis pri la malfacila ekonomia stato de UEA. Oni povis jam nun konstati grandan deficiton por la nuna jaro kaj la buĝetoj por la plej proksimaj jaroj montras ankaŭ deficitajn. Samtempe montriĝis kiel malagraba surprizo, ke la rezerva kapitalo (la fundo de H. Hodler) preskaŭ tute elĉerpiĝis kaj estas nepre necese, tuj starigi novan buĝeton. La komitato jam diskutis diversajn proponojn pri aranĝoj, celantaj redukti la elspezojn, kiuj lastatempe estis tute tro grandaj kompare al la enspezoj de la asocio. La prezidanto fine konstatis, ke la ŝanĝo okazinta en la estraro ne estis ia "palaca revolucio" — la elekto okazis tute laŭorde kaj laŭ la nova statuto de UEA kaj la nomoj de la novaj estraranoj kaj komitatanoj donas garantion por daŭra energia kaj celkonscia laboro por UEA sur la bazo de la interkonsento de Kolonjo. Li admonis al la tutmonda esperantistaro subteni tiun laboron, evitante senutilajn disputojn.

Post la klarigo de s-ro Bastien kaj paroloj de diversaj komitatanoj, i. a. de la franca kaj itala reprezentantoj, s-ro Petit kaj s-ro Orengo, la opinio de la ĉeestantaj samideanoj, kiuj tute plenigis la grandan salonon kaj galeriojn, evidente plivaloriĝis kaj oni povis per diversaj signoj konstati, ke la konfido al UEA kiel la centra organizo de nia movado restas. Al objektiva rigardanto ŝajnas, ke la decidoj de la 26a signifas naturan evoluon de nia movado kaj reunigon kaj plifortigon de UEA, la genia verko de Hodler. Ni ĉiuj kunhelpu, ke tiu espero realiĝu.

R. P—n.

## En "la urbo de floroj kaj vitraj domoj".

En unu tago la kongresanoj, interesataj pri ĝardenkulturo, estis invititaj al Hässelby, »la urbo de floroj kaj vitrodomoj». Hässelby estas ĝardenurbo ekster la ĉefurbo kaj tre konata en Svedujo pro siaj modernaj oranĝerioj kaj pro sia riĉeco de diversaj floroj kaj legomoj. La kongresanoj ĝuis de la bela tago kaj de la belegaj kreskaĵoj kaj ne malpli de la afablaj gastigantoj, kiuj al la gastoj eĉ permesis gustoprovi la diversajn surkreskaĵojn. Unu el la italaj partoprenantoj fariĝis eĉ tiel ravita ke li petis pri ofico ĉe unu el la oranĝerioj.

## Somera universitato

Plenplena salono (ĉ. 800 pers.), kiam lunde Rektoro Jansson bonvensalutis kaj malfermis la Someran Universitaton de la XXVI-a, kaj kiam Prof. *Migliorini*, Romo, komencis sian promenadon tra la persona nomaro de la mondo. Admirinde lerte kaj sperte li prezentis la tipojn kaj intencojn de antaŭnomoj tra la diversaj epokoj kaj landoj. Ĉiuj ĝojos sciigi, ke liaj nuna kaj antaŭaj prelegoj estos presotaj.

La saman intereson altiris Prof. *Collinson*, Liverpool, kiun Paul Nylén prezentis al la publiko kaj en ĉies nomo varme dankis. Komparante la nordeŭropajn lingvojn kun Esperanto, li trovis multe da similaj formoj, kunmetoj kaj konstruoj. Ankoraŭ, li diris, la ebloj de la genia Zamenhofa lingvo ne estas elĉerpitaj. Per esplora komparo kun aliaj lingvoj ni trovos multajn. Prof. Collinson mirigis nin per tute korekta elparolo de fraso el plej diversaj lingvoj.

Lektoro *Langlet*, fama sveda pioniro, elektis temon, kiun la fremduloj tre ŝatis: "Kion oni devas rigardi en Svedlando". Tiom da homoj venis, ke ni devis peti la svedojn cedi lokon al la gastoj. Belegaj kompetente elektitaj bildoj el ĉiu parto de Svedujo plifortigis la senton, ke Svedujo estas vidinda.

Marde denove tutplena salono atente aŭskultis la prelegon de eksurbestro *Lindhagen*, kiu ĵus venis hejmen de propaganda vojaĝo en la baltikaj landoj. Oni certe aŭdis ke li studis sian prelegon dum nur 12 horojn, sed ĉiu komprenis kaj ĝojis vidi kaj aŭdi la malnovan batalanton por nia ideo. Li finis per propono, kiun la pacifista ligo akceptis. Pri la rezulto li ne tre esperas post siaj spertoj pri la indiferenteco de la homoj. Sed li fidis la energion de Einar Dahl.

Multon ĉiu atendis de la lerta defendanto de Esperanto en la Radiodiskuto, Prof. *Collinder*, kaj ne vane. Laŭlingve perfekta, laŭ enhavo ege interesa estis lia prelego pri la laponoj. Eĉ por la svedoj ĝi estis travivaĵo pro la nova lumo super tiu gento, kiun donis la vortoj kaj la belaj bildoj.

Merkrede venis la interesa prelego de docento *Nordenstreng* pri la sveda popolo laŭrase. Post montrado de tre belaj tipoj el la diversaj rasoj, li rakontis





*Esperanto taŭgas! Holandino kaj svedo trovis unu la alian.*

pri la alfluo, kiuj helpis formi la nunan popolon. Malmultaj estas purrasaj, ĉiu raso havas siajn bonajn ecojn, kiuj racie kunigitaj povas produkti tre vivkapablan kaj utilan membron de la socio.

Eĉ per tre simpla, malkara aparato oni povas kapti artecan bildon. Kial oni faru kaj ne faru montris per lerte elektitaj bildoj en klasike klara kaj simpla lingvo Fil. Mag. *Setälä*, Helsinki. Multaj esprimis sian kontenton pri la praktika instruado kaj belaj bildoj. Ĉu estas eble per broŝuro konatigi la konsilojn al vasta publiko?

En la lasta universitata tago, vendrede, okazis 4 tre diversaj prelegoj. Unue parolis Lektoro *Beckman*, Svedujo, pri la ribelo de la dalekarlio. Lerte li komparis tiun ribelon kun multaj movadoj nuntempaj kaj sukcesis kapti la intereson de la publiko videble kaj aŭdeble.

Pri la nun fama bela "Tragedio de l' homo" de Madach parolis lia samlandano D-ro *Szilágyi* kiel nur poeto povas komprene paroli pri alia. Interplektante la agojn en la dramo kun la vivsorto de la aŭtoro li donis tute personan vi-


von al Adamo, proksimigis lin al ni, faris lin vera vivanta kunfrato.

Por montri siajn modernajn metodojn por etnografia esploro kaj konservo, la Nordlanda Muzeo prezentis pere de unu sia oficisto du filmojn pri la vivo nun rapide ŝanĝiganta de kamparanoj. Veraj kamparanoj aperis sur la ekrano kun siaj hereditaj kutimoj, kies detaloj ili tre zorgeme kaj nature prezentis al la publiko. Esperanta teksto sur la filmo akompanis la vortojn de la preleganto.

Lasta preleganto estis kiel la unua italo, D-ro *Musella*. Lia temo estis "La infero de Dante". Mi bedaŭras ke la samtempa montrado de la unua tonfilmo esperanta forlogis la plimulton de la kutime fidela publiko, ĉar ili tiel devis rezigni treege ĝuplenan horon. En flua, belega lingvo D-ro *Musella* (blindulo!) prezentis la fonon de la mondfama promenado tra l' infero. Oni hezitas inter admiro al la senlaca energio de la preleganto kaj la riĉeco de la temo. La tuto estis neforgesebla, kun ĝojo ni konstatis, ke la itala ministro honoris la lastan prelegon per sia kunesto. La memoro de tiuj prelegoj estas bela, kaj ni deziras ke ili povu esti konservataj laŭeble per la helpo de la preso.

Multe da laboro rektoro Sam Jansson havis por la Somera Universitato. Li dum preskaŭ du jaroj penis en la afero, kaj ni scias ke multofte li dubis pri la fina rezulto. Unu monato antaŭ la kongreso li vere ne sciis ĉu tiu aŭ tiu venos por prelegi. Malfacile estis ricevi absolutan promeson. Sed en la lertaj manoj de "la rektoro" ĉio bone aranĝiĝis kaj laŭsperte kaj -dire la S.U. de 1934 estis unu el la plej sukcesaj kaj rikoltdonaj.

*BE.n.*



*En "Malnova Upsala".*

# Rememoro. — —

*Moto: Someraj prelegoj, kuro reen-*  
*transen.*

*Vespere, gastame min atendis*  
*Skansen.*

*Svedland' mikroskopa. Mi*  
*aŭskultis kanton,*

*ho, eĉ la laponoj uzis Espe-*  
*ranton.*

(El Dagens Nyheter.)

La trian de aŭgusto finiĝis la Internacia kurso. Tiun vesperon ni kolektiĝis en la lernejo. Instruistoj kaj lernantoj diris unu al alia afablajn vortojn kaj ni ĉiuj estis tre kontentaj. Intertempe Stockholm ekesperantiĝis. Jam alvenis multe da kongresanoj. Plej rapide alvenis la piedirantoj, poste venis la biciklantoj kaj nur poste alvenis la verdfлага aŭtomobilo de la populara verkisto, filmisto Jean Forge. Sur la strato ni vidas amikajn vizaĝojn kaj la sveda vorto iĝas pli kaj pli malofta en Stockholm. — Jen Stellan Engholm, ni realigas leteran amikecon per manpremo, jen Teo Jung kun sia afabla gardistino, jen la ĉiam ridema Einar Dahl, jen s-ro Grenkamp paŝadas kun kontenta energio. Vendrede vespere. La internacia kurso mortis. Vivu la kongreso!

Sabato. Belega vetero, serena bildo ĉirkaŭ la Parlamentejo, de kie malaperis ĉio, kiu rememorigus, ke ni estas en Svedlando. — Ni estas en Esperantujo, en Internaciujo. Flagoj flirtadas en la aero, multkolora aro de la naciaj koloroj kaj super ilin altiĝas la fieriga koloro de Esperantujo. En la belega konstruaĵo amaso de la homoj. Bankoficisto, kiu antaŭ kelke da semajnoj ne povis diferencigi la esperantan vorton de la hotentota lingvo, el sia oficiala loko, kun videbla kompreno ĝuas la lingvan unuecon de la plej diversaj homtipoj. — Sed la homtipoj, kelkfoje trompas. — Mi serĉas intervju-viktimon. — Oni diras, ke tie staras alĝeriano. Kie? Jen, sur la ŝtuparo. — Mi rigardas tien. Du viroj staras tie. Unu el ili estas eŭropa tipo. Ne interese! Sed la alia, la alĝeriano, estas vere ne ĉiutaga aperaĵo. Barba, alta, bruna, impona, juna viro. Tipo de la sunbrunigitaj afrikanoj. Post mallonga interparolo klariĝas, ke la impona afrikano estas mia samlandano, hunga-

ro kaj la malinteresa eŭropano estas la alĝeriano.

Ĉiu kaj ĉio brulas en la kongresa febro, ĉiu plezure naĝadas en la varmaj kongres-ondoj, nur la bravaj kongresoficistoj faras sian malfacilan laboron, trankvile, silente, ordeme. Nun oni vidas la svedan trankvilon en plena aktiveco.

Tiel komenciĝis la kongreso, kiu certe distingiĝis eĉ en la aro de la bonsukcesintaj kongresoj per la eleganteco de la aranĝaĵoj. Kaj tiu ĉi eleganteco estis ne nur grava faktoro de la sukceso en la direkto de la partoprenintaj Esperantistoj, sed faris profundan impreson al la sveda publiko. — Kongresaranĝantoj kaj gastoj kondukis modele, Ho, kiel interese estis! — Eĉ tiu parto, kiu ne estis por la publiko, (mi pensas pri la pasia batalo dum la UEA-kunveno), donis valorajn konkludojn. — Profesoro Collinder diris al mi, ke speciale tiu parto estus povinta konvinki ĉiun dubeman eksterulon pri la vivo de la lingvo. Kiel muele turniĝis la lango de la parolantoj; ĉu iu kuraĝus diri ankoraŭ ke nia lingvo ne vivas? Lingvo, kiu fluas tiel impulse, devas esti vivanta.

Kaj en nia rememoro aperas la bildoj pri la kongreso. La unua tago, la impona solena malfermo en la belega Koncertpalaco. Plena programo jam dum la unua tago. Apenaŭ ni finis la Solenan Malfermon, jam ni kuras por interkonatiĝi al Grand Hotel. Ni estas tiom multaj, ke eble eĉ en la bankuvoj esperantistoj vespermanĝas. En la granda halo la ĉiam bonhumora Bellmankantisto — mem la rekarniĝinta Bellman, nun kun la nomo Boman — luktadas kontraŭ la amaso, kiu glutas ĉion, manĝaĵon, voĉon, kanton, ni timas, ke baldaŭ eĉ la kelnerojn kaj mem la hotelon. Fine tamen ĉio kaj ĉiu saviĝas. Preskaŭ okazis, ke la plej granda hotelo de Stockholm iĝis malgranda por la esperantistoj.

La daŭrigo de tago al tago iĝis pli impona. Oni certe parolos pri la opaj aranĝaĵoj kaj tial mi mem ne volas citi nurajn nomojn ĉi tie, sed simple mi konstatas, ke mi estis bona aŭguro, kiam antaŭe mi konstatis en mi mem, ke la brava, norda esperantistaro povas fari nur bravan laboron.

Tamen ni diru kelke da vortoj pri tiuj aranĝaĵoj, kiuj ne estis en la programo de la kongreso. — Ni devus komenci per



*La sveda esperanto-aŭtoro Stellan Engholm. — Apud li staras "la kongresa patrino", s-ino Malmgren.*

la plej grava, per la esperanta filmo, sed pri tio aliloke. Sed estis tri kunvenoj, pri kiuj ni devas diri ion. La unua: ĉirkaŭ tridek diverslandaj esperantistoj, ni estis invititaj en iu vespero al s-ro Lindhagen, eksurbestro de Stockholm. En la antaŭurba belega vilao, en la atmosfero de la plej amika kaj plej sveda gastamo ni povis admiri la naturan belecon de la stokholma ĉirkaŭaĵo, kaj tiu neforgesebla vespero, kiun antaŭis rondvojaĝo ĉirkaŭ Stockholm, en la belegaj kaj modelaj antaŭurboj, almetis ankoraŭ unu floron al la bukado de tiuj varmaj sentoj, kiuj nevelkeble ornamas la sekretan ĉambron de nia rememora kameron. — Alia intima kaj tre agrabla kunveno estis la komuna lunĉo de la "svedaj esp. libristoj kaj antologiistoj", kiun vera esperantista amikeco kaj bonhumoro orumis. — La tria okazis en la simpatia hejmo de Rektoro Jansson kaj partoprenis la someruniversitataj prelegantoj, kaj nun ni devus ripeti ĉiujn agrablajn esprimojn pri tiu ĉi kunesto. — La kvara estis la kunveno de la ĵurnalistoj, kiun partoprenis ĵurnalistoj el ĉ. dek landoj kaj kies elstara parolado

estis tiu de la prezidanto Lindberger, kiu inter aliaj akcente esprimis la neceson de tia libera kaj sendependa lingvo en la ĵurnalismo, kia estas Esperanto. Du esperantistaj oratoroj, s-roj Grenkamp kaj Morariu, konvinkis la svedajn ĵurnalistojn pri tio, ke la esperantistoj estas ambasadoroj ne nur de Esperantujo, sed de sia propra lando kaj de tiu lando, kiun pere de Esperanto ili ekkonas kaj — kiel ni Svedlandon — eĉamas.

La kongreso montris en mikroskopa denso la vivon kaj la vivkapablon de Esperanto, sed samtempe la densigitan bildon de Svedlando, kiun ĉiu kongresano konservos inter la plej agrablaj memoroj de la vivo. Kaj ni estus tre maljustaj, se ni ne parolus per kelke da vortoj pri la belega, ridema urbo, kiu montris sin en sia plej serena, sunplena koloro dum la kongresa semajno.

Kiel S-ro Kongresano diris en Dagens Nyheter:


Nun brue frapiĝis la kongresa pordo, bicikle kaj trajne, piede, per Fordo ni ĉiuj ekiras kun okulo larma:

Adiaŭ Stokholmo, nordo milda, ĉarma!

*F. Szilágyi.*

## Kongresaj fotografistoj.

Red. de Sv. Esp.-Gazeto, pro multa kongresa laboro, malzorgis pri havigo de kongresaj fotoj por represo en la gazeto. Dum la kongreso ne estis tempo por pensi pri tiaj aferoj, poste montrigis neeble ricevi bildojn ĝustatempe. Bedaŭrinde! Ni estas certaj, ke multaj bonegaj bildoj troviĝas ĉe niaj samideanoj. Ĉu estas iuj kiuj volas por ev. represo, disponigi fotojn al la redaktoro. Li estos tre dankema. Adr.: Red. de Svenska Esperanto-Tidningen, Biblioteksgatan 30, Stockholm.



*Satata la sveda vorto: "Skål"!*



## Ekskurso al Upsala

La jaŭdo estis libertago por la kongresanoj — neniam kunsidoj okazis kaj preskaŭ ĉiuj uzis la okazon por partopreni ekskurson al Uppsala. Kiel gaja aro da svarmantaj lernantoj ili kolektiĝis en la stacidomo kaj plenigis tute la vagonaron speciale abonitan. La vetero estis pli brila ol iam kaj la humoro de la ekskursantoj baldaŭ estis same brila.

La vagonaro iris rekte al "Gamla Uppsala" (Malnova Uppsala), kie la malno-

vaj vikingaj tombejoj estis studataj kun granda intereso. Oni ankaŭ gustumis la bieron, kiu estis vendata sub la nomo de "mjöd", sed ĝenerale sen envio al la vikingoj!

Poste la vagonaro returnis al la pli moderna Uppsala, kun ĝia universitato, katedralo kaj malnova reĝa kastelo, kiuj vidindaĵoj estis rigardataj je la gvido de kelkaj lokaj samideanoj. La esperantistoj de Uppsala havis grandan tagon. Tion havis ankaŭ la Urba Hotelo, kiu ricevis la komision, doni al la multnombraj malsataj gastoj manĝon. Vid-

*En la impona konstruaĵo Urbdomo de Stockholm la kongresanoj lunde fartis tre bone. Abundo de manĝ- kaj trinkaĵoj, gastama afableco de la urbo, brila sunlumo super urbo kaj homoj, novaj interkonatiĝoj, enam-iĝoj ....*

ante la pli ol mil gastojn, multaj certe kun timo demandis sin, ĉu la loko kaj la manĝaĵoj vere sufiĉos, sed la restoracio bone aranĝis la aferon, kaj post ioma atendo ĉiuj estis kontentaj. Fine oni kolektiĝis en la aŭlo de la Universitato al amuzajo aranĝita de la loka komitato.

Estis aro de lacaĵ sed kontentaj esperantistoj, kiu post la tuttaga ekskurso revenis al la ĉefurbo — preskaŭ tro lacaĵ por poste iri al la "vespero de literaturo, arto kaj bonhumoro", kiu ankoraŭ restis sur la programo de la tago.

## Inter svedaj ŝeroj

la kongresanoj pasigis kelkajn horojn dimanĉe. Tiu tago estis vere la sola ke la vetero minacis la feliĉon de gastoj kaj aranĝantoj. Matene ĝi estis ne multe promesa, kaj en la horo antaŭ la foriro oni certe dubis. Sed bonŝanco! La suno aperis, kaj en ĝia brilo la ekskurso al Saltsjöbaden bone pasis.

Al la ekskurso jam antaŭe sin anoncis partoprenontoj sufiĉe multnombraj por plenigi kvar ŝipojn. Sed montriĝis, ke eĉ ne ses ŝipoj sufiĉis, tiom multaj last-

minute volis partopreni, entute 1500 personoj. Kaj tamen kelkaj devis resti aŭ pertrajne veturi al la celo.

En gaja humoro (kanto kaj ŝerco ja estas specialaĵo de la esperantistoj) la veturo pasis, kaj trapasante Skurusundet (Skuru-markolo) la gastoj sentis specialan ravon pro la multnombra flaga saluto, kiun honore al la esperantistoj donis la posedantoj de la multnombraj vilaoj someraj ĉe la bordoj de la markolo. Amaso da vel- kaj motorboatoj cirkulis ĉirkaŭ la ŝipoj kaj kontribuis tiel al impona impresio.

En Saltsjöbaden oni pasigis kelkajn horojn, inter alie vizitante la Stokholman observatorion, kies ĉefo, prof. Lindblad, bone aranĝis kun gvidantoj kaj ankaŭ prelego tradukita en esperanto. Ankaŭ en Saltsjöbaden la gastojn oni salutis per ĝenerala hiso de la flagoj.

Entute agraba ekskurso!

*BE n.*



*Eva Swenson.*

## La internacia balo

Venis do la lasta vespero de kunestado. Ĉu oni povus pasigi ĝin pli konvene, pli gaje, pli solene ol en la urbdomo. La urbdomon jam ekamis la kongresanoj dum la urba akcepto kaj nun denove ĝi malfermis gastame siajn pordojn, nun por dancemuloj, kiuj streĉe atendis la unuan valson de la balo. Ĉie regis gaja vivo. La naciaj kostumoj es-

tis multnombraj, la muziko estis bona kaj la dancoj evidente internaciaj. La ĝenerala amikiĝo videble bone evoluis kaj la universaleco de esperanto klare montriĝis. Sed tamen oni povis konstati, ke la pensoj pri la baldaŭa disiĝo jam ĵetis ombbron antaŭ sin — multaj paroj jam diskutis la eventualan rerenkonton en Romo!

Dum paŭzo en la dancado nia de la internacia danckonkurso en Vieno fame konata dancistino Eva Swenson montris provon de sia raviga dancarto. Speciale ŝia danco 'Eva, la serpento kaj la pomo' ricevis tondran aplaŭdon.

Daŭrigis la danco, sed jam je la unua horo, je granda surprizo por niaj fremdaj gastoj, la muziko montris intencon forlasi la feston, kaj kiam ĝi duonhoron pli malfrue definitive finis la muzikon, ili ne volis kredi, ke la festo estas finita. Sed la svedaj leĝoj estas en tiu rilato severaj kaj iom post iom, preskaŭ kontraŭvole, oni foriris por aliloke daŭrigi la adiaŭon. Multaj gesolemuloj vidigis promenantaj en la urbdoma ĝardeno.

Kaj la XXVI-a internacia balo estas finita!

## “Dagens Nyheter — Tagnov- aĵoj” aĉetebla.

Dum la kongreso la ĉefgazeto de Stockholm, Dagens Nyheter, disponigis por la kongresaj novaĵoj tutan paĝon ĉiutage en Esperanto. Krom tio enestis ankaŭ ĉiutage multaj artikoloj kaj interesaj intervjuoj en sveda lingvo. Tiu gazeto faris la plej ampleksan raportaron esperantlingvan, sed ankaŭ la gazetoj Social-Demokraten kaj Stockholms-Tidningen ĉiutage enhavis esperantokolonojn.

Multaj esprimis la deziron aĉeti la numerojn 4—11 aŭg. de Dagens Nyheter, kiuj enhavis la esperantopaĝon. Ĉar estas unikaĵo, eĉ el internacia vidpunkto, tio ke ĉefgazeto tiel amplekse donis lokon por kongresaj raportoj, la koncernaj numeroj estas tre dezirataj de kolektantoj. Tial Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1, interkonsentis kun Dagens Nyheter pri aĉeto de kvanto da koncernaj numeroj, kaj la interesatoj certe devas sin tuj anonci, ĉar la disponebla kvanto ne estas tro granda. La prezo por la 8 numeroj estas kr. 2.

## Morgaŭ ni komencos la vivon.

Vendrede okazis du prezentadoj en la eleganta filmpalaco Palladium, kiam oni sinsekve dufoje prezentis la unuan esperantan tonfilmon. La antaŭan laboron ni malfacile povos forgesi, ĉar ĉiuj fervoraj voĉpruntantoj — oni ja devas scii, ke la esperanto-variante kelkajn



La ĉefrolanto: *Eric Hausmann-Strömfeldt (svedo).*

horojn antaŭ la kongreso naskiĝis — estis poste tiom raŭkaj kaj elĉerpitaj, ke ili jam antaŭ la kongreso similis preferere al mezepokaj martiroj, ol feliĉaj kongresanoj.

Sed nun ni ja devas paroli pri la filmo, eĉ filmoj. La filmo, kiu okupas la ĉefan parton de nia raporto, estas ege grava al ni, ĉar de ĝia sukceso dependas tre multe da komunaj intereso. El la vidpunkto de la konvinka forto ni jam nun devas rimarki, ke la elekto de la filmo por la esperanta tekstigo estis tre bona, ĉar oni ja povas diskuti pri tio, ke la filmo ne estas el tiu speco, kiun oni ĉiutage vidas, sed ĝuste tiu ĉi fakto distingos nian unuan entreprenon de la aliaj ŝablonajoj, el kiuj minimume "dudek faras dekduon". Do la filmo estis bone elektita. Ĝia modern-

eco, originala koncepto, tamen sen troa svingiĝo al la nepercepteblaj ekstremoj, kaj aliaj bonaj kvalitoj donas bonan ŝancon al la sorto de la unua esp.-filmo. La reĝisoro faris unuarangan laboron kaj tiun laboron ni kuraĝe povas nomi arte, ĉar li efektive verkis, almetis al la simpla temo tiajn subtilaĵojn, kiuj atingas la plej profundan analizan talenton.

La enhavo estas rapide konigebla. Malliberulo, kiu antaŭ kvin jaroj en sia subita ekscitiĝo mortigis la virinĉaseman ĉefon de sia edzino, nun liberiĝos kaj kun feliĉa optimismo li atendas la morgaŭ komencotan vivon. Sed intervenas la malbonhumora hazardo, kiu konfuzigas la vojojn de la geedzoj tiel, ke la historio kurbiĝas denove al la tragedia direkto. Oni senspire sekvas la filmon ĝis tiu ĉi punkto kaj mi mem, kiu jam duan fojon vidis la filmon, nur tion povis rimarki, ke la bileto de mia najbaro en etaj pecoj falas sur la plankon; jes la filmo streĉas la atenton, kaj subite, kiam la situacio jam estis tute peĉnigra, serenigas la okazaĵojn harmonie akompananta vetero kaj ekbrilas denove la suno de la orfaj homsortoj. La fino de la filmo atingas nin tre rapide, sed se ni analizas tiun ĉi efikon de la neatenditeco, ni devas konstati, ke ĝia kaŭzo estas la rapida ritmo de la dramo; ni ja volonte sidus eĉ pli longe en la teatro kaj partoprenus la vivon de la du homoj, per kiuj iom mallice, sed fine bonintence ludis la fatalo.

Pro la esperantoparto ni devas unuavice laŭdi direktoron *Kossmann* kaj *Jean Forge*, sed ne malpli la bravan aron, kiu sinforgese oferis tempon, forton, ripozon kaj voĉon por la sukceso. Kaj la rezulto estis miriga. Inter ili ne troviĝis eĉ unu profesia aktoro, tamen la sinkronizo dum du noktoj sukcesis tiel ke eĉ profesiaj filmaktoroj malofte trovas tiel bonŝancajn momentojn. La metala voĉo de *Einar Dahl*, la agrabla tonkoloro de f-ino *Margit Gustavsson* egale bone valoriĝas en la filmo, sed same bonegaj estas la aliaj voĉoj, s-inoj *Julin*, *Malmgren*, *Szilágyi*, f-inoj *Norre* kaj *De Waart* kaj sinjoroj *Czitrom*, *Emanuelsson*, *Forge*, *Grenkamp*, (kiun ni povas danki ankaŭ pro la lertaj kantotekstoj), *Håkansson*, *Nordkvist*.

Ankaŭ filmeton pri nia Majstro kaj italajn filmojn ni vidis, antaŭ kiuj konvinke parolis s-roj *Grenkamp*, *Migliorini* kaj *Orenga*.

*F. Szilágyi.*

## “La ferma.”

Sabate la 11-a: jam la ferma kunsido! Plenplena estis la granda salono en la Parlamentejo. En aliaj kongresoj ordinarare estis nur malmultaj ĉeestantoj ĉe la malfermo, nun la salono eĉ ne sufiĉis.



*Feliĉa s-ino Julin post “la ferma” subbrake prenas sian edzon.*

Ĉu ankoraŭ pli oni atendas rilate al la granda sensacio de la antaŭaj tagoj: UEA?

Sensacioj ne okazis, sed se oni resumas la impresojn de tiu lasta kunveno, oni devas diri, ke fortan senton oni havis pri firma volo al resanigo de la vivonervo de nia movado, de UEA. Kaj tio spite de la malagrablaj sciigoj pri la ekonomia stato. La nova prez. de UEA, s-ro Bastien, konstatis, ke: por 1933 estis defcito de 20.000 sv. fr.; por 1934 estos la defcito c:e 15.000; kaj jam antaŭvidita defcito por 1935 estas 20.000. De la siatempe granda donaco de s-ro Hodler (dekomence granda, en 1928 ĉ. 100.000) nun efektive, pro monvalutaj kaj aliaj kaŭzoj, restas nur ĉ. 7000 fr. Do, se oni realigas ĉiun eblan kapi-

talon ni povos kovri la defciton, sed poste? La nova komitato jam komencis sian laboron kaj trovis kelkajn eblojn por ŝpari, kaj la esperantistoj devas fidi al la volo je energia laboro. — Ni fidos, ni laboros, ni venkos!

S-ro Isbrücker, nova vicprezidanto, kiu cetere dum la kongreso plurfoje aliris al sia personeco la publikan atenton, nun lerte uzis la favoran okazon kaj atakis la oferemon de la kongresanoj: Unu nederlandano, diras Isbrücker, promesis al UEA plialtigi sian kotizon ĝis 250 nederl. guld. Kiuj volas imiti? Ĉi tie en la salono 700 personoj, ĉu ne 5 % el ili povus tuj sin anonci kiel ekz. Membroj-Subtenantoj? Do, 35 personoj! S-ro Isbrücker ricevis tujan kaj spontanegan respondon: en mallonga tempo kaj tiel rapide, ke eĉ estis neeble ĉiujn noti, sin anoncis unu kiel “dumviva”, unu Patrono kaj ne malpli ol 40-o kiel Membroj-Subtenantoj. — Multaj tiel lerte aranĝitaj, agrablaj surprizatakoj, kaj s-ro Isbrücker kaj la kunkomitatoj estas bone survoje al la savo de UEA!

S-ro Bastien en la nomo de la gastoj esprimas nun ĉies dankon por la kongresa semajno. Precipe al Rektoro Jansson kiel ĉefo de Som. Universitato kaj al LKK-anoj, s-roj Julin, Malmgren — “la sekretario, homo ĉiam trankvila, ĉiam afabla” —, kaj Lindstedt; al s-ro Kreutz — “la larĝa ŝtono, sur kiu fundamentas niaj kongresoj” — kaj al ĉiuj kunhelpantoj. Sed ni ne forgesu ankaŭ alian homon, al kiu ni ŝuldas multe. Oni multe parolas pri eminentuloj. Ni pensu al tiuj multegaj esperantistoj, kiuj senlace laboras en urbetoj, en profesiaj rondoj, — kies nomojn oni ne konas, kiujn oni ne renkontas en la kongresoj, ĉar ili ne estas sufiĉe riĉaj por kongresvizito. Ni salutu la nekonatan esperantiston! (Leviĝo kaj aplaŭdego.)

La ĝenerala sekr. Malmgren dankas al s-ro Bastien kaj daŭrigas: “Mi volas aldoni la nomojn de la ceteraj helpantoj-konsilantoj de la LKK: f-inoj Gunhild Berg kaj Helmi Josefson, s-roj Sven Bohlin, Bror Ejve, Bernhard Eriksson, Nils Hedgren, Adolf Larson, Erik Malmkvist, Rudolf Pehrsson, Tore Westberg. Krome s-roj Szilágyi, Dahl kaj Söderberg, gesinjoroj Engholm, la edzinoj s-inoj Julin kaj Malmkvist, kaj ankaŭ mia propra edzino. Mi sentas min kiel patro de la kongreso; sed devas an-

kaŭ esti kongrespatrino, kaj tiun rolon bone plenumis mia edzino. Fine ni ŝuldas dankon al la helpantoj en la kongresejo, kiuj donis al ni gravan helpon, al la gazetistoj. La aranĝo de la kongreso certe kaŭzis multan laboron, sed kiam la Universala Kongreso alproksimiĝis, ni renkontis tiom da simpatio, ke ni nun ne sentas laciĝon. Ĉiu estis favora al ni, eĉ la ĉielo. — Kiam ni nun staras je la fino kaj venkis en la batalo, tiam ni absolute devas ankaŭ eluzi la venkon. Mi volus diri: *Nur nun komenciĝos la laboro!* Ni ĉi tie kaj ankaŭ vi en eksterlando eluzu la favoran situacion. En la komenco s-ro Isbrücker diris, ke tiu ĉi kongreso donu al ni la pacon. Dum la kongreso okazis disputoj; sed nun mi havas la senton ke regos paco. Se ni ĉiuj kunlaboros, tiam ni venkos”.

Post kelkaj raportoj (fakajn raportojn oni ricevis jam en la komenco de la kunsido), inter alie de Jean Forge pri la tre grava filma afero (en kiu li dankas al Sveda Esp.-Federacio, kiu ebligis tiun unuan esp. filmon), la prezidanto s-ro Julin finas per jenaj vortoj: ”Ni vere atingis la finon de la kongreso. Per la invito al Stokholmo la svedaj esperantistoj volis fari sian devon por la movado, sed ankaŭ por siaj propraj celoj ili kunvokis la kongreson. Jam s-ro Malmgren parolis pri tio. La granda bruo, kiun vi ĉiuj volonte faris en Stokholmo, estas por ni la plej bona reklamo, kaj nun estas nia devo, eluzi tiun reklamon por la daŭriga laboro. Tial ni svedoj kore dankas al vi ĉiuj pro via helpo. Multon vi faris por nia sveda movado. Ni deziras al vi bonan vojaĝon!

Kaj per ”La Espero” oni finas la XXVI-an Universalan Kongreson.

*BE n.*

## “S-ro Kongresano”

serio de tre amuzaj desegnaĵoj, kiuj dum la kongresa semajno aperis en la gazeto Dagens Nyheter, estos represita entute en la okt. numero de Svenska Esperanto-Tidningen. La arte faritajn desegnaĵojn, kiuj de tago al tago montras ĝuste la tipan faron de ĉiu tago, desegnis la desegnisto ĉe D. N. s-ro Lundkvist. La koncernajn tekstojn faris D-ro F. Szilágyi.

## Tiuj, kiuj faris ĝin. —

”En multaj kongresoj, naciaj kaj internaciaj, mi havis la okazon kunlabori kun multaj personoj en organizaj aferoj, sed neniam ĝis nun mi vidis aŭ spertis tian laborkapablon kian havas s-ro Malmgren. Ĉion li surprenas al si kaj ĉion li bonatingas”. Tiu diraĵo de la prezidanto de la XXVI-a Universala Kongreso de Esperanto, s-ro Julin, karakterizas la organizan flankon de la kongreso. Estas plejparte kreaĵo de la ĝenerala sekretario de la XXVI-a, s-ro *Ernfrid Malmgren*, tiu kongreso, kiu cetere laŭ prijuĝo de la kongresanoj povas stari kiel antaŭbildo por venontaj kongresoj. En diktatora maniero, tamen kun ĉiama afableco, s-ro Malmgren gvidis kaj estis la preparajn kaj dumkongresajn laborojn, multfoje tiel diktatore ke estis necesa al li admono aŭ riproĉo pro tro memfida laboro. Sed eble feliĉe ke tiel estis, feliĉe kaj por la ceteraj komitataj kaj por la prospero de la kongreso. Dum preskaŭ du jaroj li dediĉis sian tutan libertempon por krei de la tagoj 4—11 aŭg. 1934 indan verdan semajnon. Ĉiam estis lia celo: la Stokholma kongreso la plej bona ĝis nun!

Ke plejparte li sukcesis, pri tio neniam dubo, sed ankaŭ ne estas dubo ke sen la bonega helpo de la du aliaj membroj de LKK eĉ ne la grandaj kapabloj de s-ro Malmgren sufiĉus. La plej bonan gajnon havis la kongresa laboro, kiam s-ro *Teodor Julin* surprenis al si la postulan taskon esti prezidanto de LKK. Siajn spertojn rilate al organizado de diversaj grandkongresoj li disponigis al la komuna laboro, kaj lia, precipe dum la kongresa jaro, senĉesa kaj ofera laboro estis por la kongresa komitato unu el ĝiaj plej valoraj havaĵoj.

Eksteren oni ne rimarkis tiom multe la trian personon, la kasiston de LKK s-ro *Hjalmar Lindstedt*. Sed la aranĝintoj de ĝisnunaj kongresoj scias, ke la kongresa kasisto ne estas la malplej grava kaj ke li havas oficon kun granda respondeco. Ke s-ro Lindstedt envere plenumis sian parton, tion oni komprenas sciante ke dum la kongresjaro je preskaŭ ĉiu horo li estis renkontebla en la kongresa sekretariejo, de frumatene ĝis la lastaj horoj de la tago. Kaj la kongresaj tagoj estis multfoje vera purgatorio por li, devanta respondi kaj klar-



igi al ĉiuj pri kotizoj kaj aliaj aferoj. Ĉar strange estas, ke kiel bone kaj zorgeme oni ĉiam antaŭpreparas kaj klare montras kiel devas esti rilate al tiaj aferoj, ĉiam estas multe da laboro dum la kongreso nur por tiaj partoprenantoj, kiuj ne laŭorde aranĝis siajn ekonomiajn aferojn. Tion multe spertis la kongresa kasisto.

Jen do la triopo, kiu ĉefe faris la XXVI-an. Honoron al ili! Ili povas senti sin kontentaj, esti feliĉaj pro la brila paso de la kongresaj tagoj kaj esti certa pri la granda dankemo al ili de la tuta esperantistaro, kaj precipe pri tiu de la sveda esperantistaro, kiu dank' al ili post tiu grandstila kongreso povas ekkomenci certe eĉ pli fruktodonan laboron ol iam antaŭe. La kongreso kun siaj efikaj aranĝoj al multmiloj da skeptikuloj donis alian perspektivon kaj percepton, donis imagon pri la ebloj kaj la interna forto de nia lingvo.

*BE n.*

## La nervcentro de la kongreso. — —

Ĉiuj vojoj kondukos al Romo venontjare. Sed ĉijare la multaj kongresaj fadenoj kuniĝis en Stokholmo, kiu fariĝis vera nervcentro, pli ampleksa kaj pli komplika, ju pli alproksimiĝis la tago de la malfermo.

La plej multaj el la kongrespartoprenantoj alvenis Stokholmon, rapidis per moviĝemaj piedoj, tramo aŭ aŭtomobilo al la jam mendita kaj atendanta loĝejo, kuris al la kongresejo, akceptis la kongresajn dokumentojn kaj ektravivis la nepriskribeblan kongresĝuon sen aliaj zorgoj ol pensoj pri kunvenoj, amuzajoj aŭ pli malpli oficialaj rendevuoj. Kaj ni ĉiuj fartis bone.

Sed ĉu ni sufiĉe serioze pripensis, kiom da laboro, penoj, klopodoj kaj streĉoj necesis por funkciigi kongreson kun proksimume 2000 anoj? Eble ne. Tamen ni iomete pripensu la taskon de tiuj samideanoj, kiuj dediĉis tempon, forton kaj ĉion alian, kio estas bezonata por aranĝi ĉion. Mi ne atentigas vin pri tio, por ke vi eklaŭdu la aranĝintojn. Tute ne, samideano, ili faris sian devon pro intereso pri kaj amo al Esperanto.

Se vi mem ne partoprenis la preparajn laborojn, vi absolute ne kapablas imagi, el kiom da detaloj konsistas kongresa aranĝo. Ne sufiĉas surpapera kalkulado, dissendo de aliĝiloj, informoj por la gazetoj, mendo de loĝejoj kaj similaj aferoj, ni ne hezitas diri, ke tiuj pli grandaj aranĝoj estas relative facile fareblaj. Sed inter tiuj granitaj kolonoj svarmas miloj kaj ree miloj da neatenditaj brikoj, kiuj falegas de ĉiuj flankoj sur la ŝvitajn kapojn de la kongrespreparantoj. Kaj ĉiu briko devas esti metata sur la ĝustan lokon. Alie, Dio gardu la metistojn. La samideano estas kaj riproĉema kaj kritikema.

Mi konstatis, ke granda parto el la esperantistaro estas tre demandema. Kaj multaj havas tre altan taksadon de la kapablo de la anoj de la kongresa komitato. Oni demandas pri ĉio inter ĉielo kaj tero. Iu insiste petas nin telegrafe informi pri adreso de fraŭlino Greta, kiu loĝas ie en Svedujo. Kvankam nia kuniĝita kono pri "Greto-j" ampleksas almenaŭ 60, ni ne sukcesis kontentigi la demandinton, ĉar en Svedujo loĝas kelkaj centoj da ĉarmulinoj, kiuj venas, kiam vi flustras la nomon "Greta".

Sed nia plej granda problemo estis la konata fakto, ke tro multaj lastminute alsendas la aliĝilojn. Tio kaŭzas multan laboron, kiun oni povus eviti, se la samideanoj bonvolus ne prokrasti ĉion ĝis kvin minutoj antaŭ la komenciĝo.

Ni eldonas gazetajn informojn kaj aliajn sciigojn, por ke la verduloj ĝustatempe konu la programon kaj la detalojn de la aranĝoj. Sed ofte ŝajnas, ke la homoj ne uzas la legkapablon, kiun ili post multe da penoj kaj larmoj akiris. Estas facile konstateble. Ĉar grandaj pakajoj da leteroj kaj kartoj amasiĝis sur la tabloj, kaj la enhavo de la skribaĵoj estis tia, ke neniu el la skribintoj ĝenus la komitatanojn, se oni nur uzus la okulojn por legi. Sed tio estas peko, kiu estas pli internacia ol Esperanto.

Mi ne mensogas, dirante, ke almenaŭ kelkaj el la gesamideanoj, kiuj oficis en la kongresa sekretariejo, perdis konsiderindan kvanton de la korpa grasaĵo. Neniu plendis pro tio, mi nur konstatis la fakton.

Unu el la plej tedaj kaj enuaj partoj de la antaŭkongresa laboro estis la kunmetado de la diversaj biletoj. Dekduo da energie laborantaj gesamideanoj dediĉis preskaŭ tutan tagnokton por finfari tiun

tre gravan taskon. Mi asertas, ke iliaj koroj estis plenplenaj de kontento, kiam la lasta kuponaro estis metita en la koncernan dokumentujon.

Dum la kongresaj tagoj vi mem havis okazon rimarki, ke la oficistoj ne rajtis kuŝi sur dorso aŭ eksidi en unu el la salonoj por aŭskulti belan paroladon aŭ partopreni la diskutojn. Ili similis al sukerpecoj, kiuj altiras la muŝon. Ili estis treege popularaj. Preskaŭ neniu preterpasis ilin sen danko aŭ malica rideto, afabla aŭ riproĉa demando, scivola aŭ insulta alparolo.

Ĉu vi povas???? Jes, certe ili povis. Laŭkapable ili respondis, konsilis, informis k. t. p. Kontentaj homoj foriris, malcontentaj alvenis. . . . Demando. . . . respondo. . . . Dankon. . . .

Kaj kiam ni aliaj veturis al Laplando, Visby, Finnlando k. t. p. por ĝui la belaĵojn de la mondo, kelkaj el la oficistoj adiaŭis nin ĉe la stacidomo, svingis la naztukojn kaj deziris bonan vojaĝon. . . La vagonaroj kaj ŝipoj malaperis en la malproksimo.

Restis la kongresaj komitatanoj de la 26-a. Ilin atendis amasoj da papero kaj montoj da ciferoj: Laboro postkongresa. Ni kore dankas la senlacajn kamaradojn! Ili ĝuu kaj ripozu sur itala tero venontjare.

*P—ano.*

## Festo de la Antologio.

Merkrede la 8an de aŭg. Eldona Societo Esperanto invitis la kunlaborantojn de Sveda Antologio al festeno en la restoracio Källhagen. Tie oni povis vidi inter la gastoj, la motoron de la antologia laboro, rektoron Jansson, lian ĉefan helpanton d-ron Szilágyi kun edzino, gesinjorojn Morariu, kaj la plej multajn el la kunlaborantoj, i. a. la veteranon esperantistan s-ron John Lundgren el Hedemora. Samtempe estis invitataj kelkaj eksterlandaj gastoj, el kiuj estis venintaj redaktoro T. Jung kaj la sekretario de Brita Esperanto-Asocio s-ro Goldschmidt, kaj aliaj amikoj kaj kunlaborantoj de la Eldona Societo, inter ili redaktoro P. Nylén, s-ro Stellan Engholm kaj fil. lic. Frits Lindén. Rektoro Jansson unue dankis al la kunlaborantoj de la antologio kaj klarigis iomete la organizon de la laboro. S-ro Halldor en la



*La estro de Eld. Soc. Esp., red. H. Halldor, pensas pri novaj eldonoj.*

nomo de la estraro de la Eldona Societo dankis precipe rektoron Jansson pro lia sindona laboro je la antologio, plue li dankis ĉiujn kunlaborantojn de la antologio kiel ankaŭ ĉiujn aliajn ĉeestantojn, kiuj diversmaniere kunlaboras kun la Eldona societo. Ĉiu ĉeestanto ricevis binditan ekzempleron de la antologio. Li ankaŭ skizis la historion de Eldona Societo kaj esprimis sian esperon ke ĝi daŭre progresu. S-ro Jung parolis en la nomo de la eksterlandaj gastoj kaj dankis pro la invito. Li gratulis al la Eldona Societo pro ĝiaj bonaj progresoj kaj laŭdis ĝiajn eldonaĵojn, kiuj pli kaj pli perfektigis ne nur laŭ enhavo sed ankaŭ laŭ eksteraĵo. Post ankoraŭ kelkaj paroladoj finiĝis la festo per kantado de *La Espero*.

Al ĉiu kongreso vojaĝas areto, kies vizaĝoj aperas kiel firmaj punktoj en la kongresanara amaso. Estas ĝojige. Sed estus malĝojige, se ne novaj floroj ekaperus en la esperanta florbedo. Tio signifus stagnon. Dank' al Dio svarmas la novaj vizaĝoj — unu pli simpatia ol la alia. En la vejnojn de nia movado fluas juna, freŝa sangotorento.

# Norden!

Kiam la aliĝiloj por partopreno en la diversaj postkongresaj ekskursoj atingis min mi tuj decidis kunveturi al Laplando. Preskaŭ nekredible estis la mal-kara prezo de 150 kronoj por tiu riĉenhava, bone preparita programo, konstato, kiu vere ĝojigis niajn korojn esperantistajn. Multaj, kiuj lastmomente volis kunekskursi al la norda teritorio, sed pro manko de loko ne plu ricevis biletojn, adiaŭis nin per larmoj en la okuloj sur la perono de la ĉefstacidomo. 3 dormvagonoj, dum tago kaj nokto niaj fidelaj akompanantoj, enloĝigis la 120 partoprenantojn. Flagoj flirtis en vento. Ĝis revido belega, impona urbo Stockholm!

Preterflugis bone prizorgataj kamparoj, arbaroj, verdantaj herbejoj, vastaj lagoj, puraj dometoj, vilaĝoj, malgrandaj urboj. Impreso restas. Ju pli longa la veturado, des pli interesa.

En la vagono inter gesamideanoj oni sentas sin hejme: mallaŭte iu samideano ekkantas, baldaŭ kelkaj kunkantas, la tuta vagonaro en bonhumora stato refreŝigis la jam laciĝintajn geamikojn. Violono eksonis en alia vagono. Iom pli vigle oni kantis naciajn melodiojn.

Alproksimiĝis Boden, esperantistoj salutis nin. Grava momento venis. Ni transpasis la nordan polusan cirklon. La spertuloj survoje preparis dekojn da poŝtkartoj por uzi la 2 minutan haltigon de la vagonaro, enkestigi la poŝtaĵojn pro la valora polusa ŝtampo.

Dormante je noktomezo ni atingis Kiruna. Matene oni rakontis al ni, ke multamase la geesperantistoj estis en la stacidomo por saluti nin, sed ni ne atendis tiun afablecon. Ni jam alkutimiĝis al niaj dormvagonoj kaj profunde, senhalte ni dormis ĝis sufiĉe granda bruo de kelkaj fruleviĝantoj vekis nin. Lavo, matenmanĝo. Sub gvidado de niaj nelacigeblaj Kirunaaj geamikoj ni vizitis la grandan ferminejon, nordstilan preĝejon. Aŭtomobiloj veturigis nin al interesa finna-lapona vilaĝo Jukkasjärvi. La migrantaj nomadoj dum vintro starigas siajn tendojn en tiu vilaĝo kaj ripozas. Interesa estis la ŝtata malgejunula laponaj hejmo.

Reen al Kiruna, kie ni ĝuis amuzan vesperon kun la ĉi-tieaj afablaj samideanoj, kaj kie ni interkonatiĝis kun la svedaj popoldancoj. Nur post noktomezo

ni serĉis niajn dormvagonojn; eĉ kelkaj gesamideanoj laŭdire faris "lunbrilpromenadon".

Antaŭen al la plej norda sveda regiono: Abisko. Granda la surprizo! Montoj kreskas el la tero per neĝo kovritaj; mirinde la lagoj, la "suda" blua ĉielo, la suno, imponaj la nuboj. Riveretoj fluetas super rokoj kaj ŝtonoj. La sento plene ŝtopita per naturbeleco strikas. Oni grimpas sur la montojn, vizitas per ŝipeto la tendaron de la laponoj en Polnaviken. 2 laponaj knaboj gvidas nin al la sveda-norvega landlimo. Ĉie novaj impresoj!

Vespero venis. Tute hela estis la nokto. Kelkaj el ni ankoraŭ ĝuis la trankvilan, romantikan ĉirkaŭaĵon de Abisko. Malproksime oni kantis. Ni sekvis la fremdajn laŭtojn kaj hazarde ni staris antaŭ laponaj tendoj. Preskaŭ ne spirante ni aŭdetis. Silenteme ni foriris.

Post dutaga ripozo en Abisko iom pli norden. Transpaso de la norvega landlimo, pli grandaj la montoj, pitoreskaj, nur ŝtonoj, lagoj, golfoj.

Narvik, havenurbo. Esperantistoj akceptis nin, montris la vidindaĵojn. Sipekskurso sur belega golfo ....

Posttagmeze oni starigis memorŝtonon je honoro de la vizito en la plej norda urbo, en kiu Esp.-grupo vigle laboras.

Reen al Svedlando. Mallonga vizito en Kiruna: interparoloj kun la fidelaj anoj de nia kara lingvo, amikaj rondoj en intima restoracia ĉambro, nokta promenado de kelkaj nelacigeblaj geesperantistoj, envagonigo.

Porjus (Harsprånget), ŝtonvojo kondukis nin al la mirinda akvofalo. Impona! Grandioza! — Vizito de granda elektra stacio.

Sudenvojaĝo. Belega Stockholm atendas nin. Pli proksimiĝis la geesperantistoj ligataj per lingvo internacia en tiu postkongresa vojaĝo. Amike oni adiaŭis. Longe ankoraŭ restos la memoro. Dank' al tiuj, kiuj tiel bonege aranĝis tiun ĝuplenan postkongresan vojaĝon. Dank' al tiuj, speciale al s-roj Malmgren, Hägglund kaj Bengtsson, kiuj dumvoje por ni pensis kaj agis, kiuj senlace zorgis dum tag- kaj nokto.

*Manja Gernsbacher, Köln.*

Tiu ĉi numero aperas kiel aŭg.-sept.-numero. Post la streĉa laboro antaŭ kaj dum la kongreso ankaŭ la redaktoro bezonis iomete da ripozo. Pro tio nun dubla numero.

## La kongreso en la spegulo de kelkaj opinioj:

*Profesoro Migliorini* (Romo): Mi mem antaŭ nelonge havis okazon partopreni aktive la aranĝon de lingvista kongreso, kiun ĉeestis 300 personoj. Kaj ĝuste pro tio, ĉar mi konas la malfacilecon de la aranĝoj ĉe pli malgranda kongreso, mi povas laŭmerite taksi tiun precizan kaj modelan aranĝon, kiu ĉefe karakterizis la tre allogan kongreson en Stockholm. — Estas malfacile pli laŭdi iun aŭ alian aranĝaĵon, sed eble facile klarigeble, la somera universitato, ties kunmeto kaj kontribuaĵoj havis mian plej grandan simpation kaj komprenon kaj mi estas speciale dankema al Rektor Jansson, kiu tiel bonŝance kaj ame prizorgis tiun parton de la kongreso. — Sed mi devus paroli pri kiu ajn parto de la kongreso kaj oni devus mencii aparte ĉiun kaj ĉion, sed neeble.

Post la kongreso mi partoprenis la nordan — Laponian — vojaĝon, kiu donis al ni ĉiuj eterne agrablan kaj belan memoron, ne nur pro la natura kaj surprize multkolora beleco de la Nordo, sed ankaŭ pro la prizorgo kaj belega laboro de la organizantoj, el kiuj mi ne povas preterlasi la nomon de s-ro Verner Hägglund, kiu oferis al ni multege da tempo kaj forto.

Ni italoj havas malfacilan laboron, se ni volas per la kongreso en Romo superi aŭ forgesigi la stokholman kongreson.

*F-ino Jemima Downie* (Glasgow, Skotlando): . . . Mi reiros hejmen kaj kunportos multajn tre agrablajn memorojn. . . . La ekskurso al Visby ankaŭ estis granda sukceso — entute mi pasigis tre ĝuidan libertempon . . .

*S-ro Rivière* (Alĝerio): Ni estas korduŝitaj pro la boneco de la svedaj gesamideanoj. Por ni, sudlandanoj, estis granda surprizo vidi tiel belegan landon, pri kies allogaĵoj ni ne havis imagon. Svedlando eble estas la plej kultura lando de Eŭropo. Kiel fakulo mi vizitis la Centran Poŝtejon kaj mi povas diri, ke mi estis ravita de la belega organizo kaj de la afableco, per kio oni min akceptis.

*S-ro Juan Barceló Andreu* (Hispanujo): Mi jam partoprenis plurajn kongresojn, inter ili tre bonsukcesintajn, sed la stok-

holma kongreso eĉ inter ili okupos eminentan lokon en mia memoro. Mem la kongresejo, la Parlamentejo, tre imponis al mi, ĝi estis vasta, agrabla kaj eleganta kaj certigis tre agrablan ĝeneralan atmosferon . . .

*F-ino de Waart* (Holando): . . . Mi fartis jam bonege dum la antaŭkongresaj tagoj pro la tre agrabla internacia kurso; mi dankas la kongresaranĝantojn pro la bonega organizo. Mi spertis en Svedlando simpation al Esperanto eĉ inter tiuj, kiuj ne parolas nian lingvon. Post la kongreso mi vojaĝadis en via bela Dalekarlio, kaj la verda stelo neniam forlasis min; eble pro tio mi neniam povis dum mia libertempo enlitiĝi en tiu tempo, kiun mi antaŭe decidis.

*Generalo Bastien* (Paris): Bela, belega kongreso! Honoron al la sindonaj preparintoj!

*Rudolf Pavlik* (Aŭstrujo): Mi havas eternan ĝojon pro tiu unika aranĝo de la 26-a.

*Teo Jung* (Köln):

. . . kaj jam la lasta tago!

Rapide flugas tempo for:

jam batas adiaŭa hor'.

Kongreso restos nur memor'!

sed freŝan forton al la kor'

ĝi donis — do ek al labor'

al nova vigla ago!

. . . dankon pro la bonega organizo . . .

*L. Agontine* (Parizo): Post la kongreso . . . Svedujo havos eksterlande centojn da novaj amikoj.

*S. Grenkamp* (Parizo): . . . Mi ĉirkaŭbrakas pense vian unikan urbon, kiu tiom kore, sincere, amike, sindone kaj sinforgese akceptis nin . . . Feliĉa urbo kaj lando, kie eĉ ĉiu laboristo ricevas la permeson surmarmorigi la plankon de la urbdoma blua salono laŭ sia plaĉo — kaj ĝi kreas harmonian mozaikon . . .

### Prelego pri la lumbildmetodo.

Ĉar tiuj, kiuj ne veturis al Upsala, plejparte vizitis la Parlamenton por aŭskulti la prelegon de *d-ro Szilágyi* pri la lumbildmetodo, ankaŭ tiu ĉi prelego havis grandnombran aŭskultantaron. El la aplaŭdoj oni devas konstati, ke la populara metodo rikoltis sukceson ankaŭ ĉe la internacia publiko. Tion cetere pruvis ankaŭ la sukceso de la antaŭkongresa internacia kurso.

# Kiam mi filmis.

En la proksimo de Stokholmo situas Råsunda, Svedlanda Hollywood. Milfoje mi legis pri la loko', ĉar la gazetoj sin tre interesas pri la vivo de la "gefilmsteloj" kaj sciigas per detalaj kaj intimaj raportoj pri la tieaj okazantaĵoj. Neniam en mia tuta vivo mi kuraĝis revii pri tiu tago, kiam mi mem staros antaŭ la filmaparato. Sed okazas ke la vivo surprizas pli ol la fantazia revado.

Esperanto kaj parolfilmo estas kiel geedzoj. La evoluo de la filmarto aktualigis la internacian lingvan demandon. La produktistoj staras antaŭ la neforigebla fakto, ke la naciaj lingvoj ne tute taŭgas. Kiu kuraĝos frakasi la konservativan vidpunkton, kiu konsideras nur la naciajn lingvojn taŭgaj por la filmo? Iu devas komenci kaj montri la ireblan vojon, la solvon de la enigmo de la malfacilaĵoj.

Jean Forge estas konata nomo inter la esperantistoj. Ni scias, ke li ne nur verkis bonajn kaj ŝatajn originalajn librojn, sed ke li ankaŭ fervore klopodis en la filma kampo por kapti la atenton de la filmistoj kaj igi ilin almenaŭ ekzameni la eblojn de Esperanto.

Li venis al Stokholmo okaze de la kongreso por fari ĉe la svedaj samideanoj proponon, kiun li pensis revoluciiga. La estraro de SEF pritraktis la proponon, kaj post ioma ekonomia kalkulado kaj konsidero, oni estis preta akcepti.

Forge tuj komencis sian laboron. Por la esperantigo de la filmo, kiun li elektis, li bezonis bone parolantajn geesperantistojn. Kaj inter la samideanoj en la kongresa sekretariejo li kaptis siajn "viktimojn".

La intereso estis grandega. Per tramo kaj aŭtomobiloj ni scivolaj veturis al Råsunda. La unuan vesperon kaj sekvan nokton ni ekzercadis senĉese. Kaj la germana produktisto d-ro Kossmann kaj amiko Forge estis severaj reĝisoroj. Nenio okazos hazarde aŭ estos dua-klasa. La unua esperanta parolfilmo montros la vojon, estos ekzemplo kaj estos kritikata de la profesiaj filmkritikistoj ne nur en Svedlando sed en ĉiuj landoj, kie la filmo espereble estos montrata. Kvalita laboro estas la postu-

lo. Pro tio nenio estu lasata al la hazardo.

Ni estis ĉiuj simplaj amatoroj sen ia ajn sperto. Ni laciĝis, estis inspirataj denove, oscedis kaj raŭkiĝis pro la daŭra ripetado. Kaj kiam la vivo de la filmurbo en la frua mateno komenciĝis, ni lacaj iris en la aŭtomobilojn kaj veturis rekte en la litojn.

Postan vesperon ni denove eklaboris. Nun la inĝenieroj de Sveda Filmindustrio estis pretaj eternigi niajn pli malpli belajn voĉojn sur la filmrubando. Ĝis la 8-a matene daŭris la laboro, interrompita de nokta lunĉo en la filmrestoracio. Mi devas konfesi, ke mi dubis pri la finrezulto kaj timis, ke ni ne kontentige plenumis niajn devojn. Forge estis konvinkita pri sukceso, kaj lia optimismo kuraĝigis nin.

Pri la unua prezentado en Palladium mi nur diras, ke laŭ la gazetara kritiko kaj la eldiroj de la publiko oni povas konstati, ke la provo sukcesis. Pri fiasko ne estu parolata. Esperanto montris grandioze sian nepridiskuteblan taŭgecon.

Mi bone konscias, ke la enhavo de la filmo ne estas amuza kaj facilanima. La filmo ne estas sepklasa produktajo sed laŭ filmarta vidpunkto unuaranga. Kaj ni pripensu, ke la unua esperanta parolfilmo devas esti arte komponita kaj fotografita. Ĝi estas ekzamenota kaj kritikota provo. Tion ni ne forgesu.

La prijuĝon de la monda kritikistaro ni ne hodiaŭ povas koni. Sed tiom ni povas jam nun diri, ke la iniciato estas laŭdinda. Eble ĝi forprenos la skvamojn, kiuj kovras la okulojn de multaj kaj fariĝos la fajroradio, kiu degeligas la glacian nekomprenemon de tiuj homoj, kiuj bezonas Esperanton sed pro ia nedeĉifrebla kaŭzo rifuzas preni la etenditan manon.

Homa kunnaska protestemo krii kion ajn — Esperanto kaj filmo estas geedza paro.

*Valo.*

## Eksterlandaj instruistoj,

kiuj jam troviĝas en Svedlando kaj estas pretaj gvidi Esperantokursojn, bonvolu interrilati kun

*Sveda Esperanto-Federacio,  
Fredsgatan 4, Stockholm.*

## El la memorlibro. — —

Mi ĉeestis multajn esperantajn kaj neesperantajn kongresojn kaj sentis tiun specialan ĝojon, kiun elvokas la kunestado kun homoj same agorditaj. Neniam mi estas tiel kontenta kiel post esperanta kongreso. Mi parolis kun amiko pri tio. Li samopinias. Esperanto-kongreso en ia neklarigebla maniero altiras la interesojn kaj kunligas la partoprenantojn. Ĝi kreskigas bukedegon da belaj floroj, kiuj dum jaroj poste odoras kaj feliĉigas.

\*

Ni ne vizitas kongreson nur por labori, aŭskulti sciencajn paroladojn kaj diskuti la fakajn demandojn. Ĉio tio estas necesa por doni la trajton de graveco, pruvi la uzeblecon de nia lingvo kaj olei la maŝinaron de la movado. Sed por la plej multaj el ni komunaj kunestadoj en rondoj de novaj kaj malnovaj amikoj estas la plej ĉarmaj partoj de la kongreso.

\*

Stokholmo ne estas komparebla kun Parizo, Berlino aŭ Budapeŝto rilate al la restoracia vivo kaj amuzoj. Sed la sveda ĉefurbo posedas tipajn idiliojn kaj specialajn plezurojn, kiujn aliaj pli grandaj mondurboj malhavas. La pureco estas laŭdinda. Rilate al ĝi ŝajnas al mi, ke ĉiuj miris.

\*

En esperanta kongreso oni ploru nur dum la fermo kaj je la adiaŭo. Estas la 18-a regulo de Esperanto. La 17-a tekstas jene. Edzo neniam kontentige sukcesas esperantistini la edzinon. (La bone parolantaj edzinoj lernis Esperanton antaŭ la edziniĝo.)

\*

Mi ne scias, ĉu la LKK faris specialan favorkontrakton kun la dioj de la vetero. Ni venis al belega Svedlando por esplori la konatan landon de la Nordo. Ni iom seniluziĝis. Ardis tropika suno de sur klare blua ĉielo. Ni ne bezonis la lanajn subĉemizojn aŭ devegis aĉeti vintrajn peltojn. Hejmenveninte, mi rakontos al la enloĝantoj de nia vilaĝo, ke glaciaj ursoj vivas nur en Skansen. Sur la stratoj de Stokholmo promenadas afablaj dukruraj bestoj, apartenantaj al la gento Homo.

\*

Laŭ oficialaj statistikaj informoj la kongresanoj ĉe la akcepto oficiala en

la urbdomo konsumis ne malpli ol 7000 buterpanojn, kaj proksimume 800 litroj da biero torentis malsupren tra sekaj gorĝoj. Krome nekalkuleblaj amasoj da tortpecoj kaj kuketoj, bareloj da kafo kaj teo kaj montetoj da cigaredoj. Mi ĉikune dankas al Stokholmo pro la montrita afableco. Samtempe mia konscienco devigas min konfesi, ke mi manĝis 5 buterpanojn anstataŭ 3.

\*

LKK. laboris modele rapide. La mil kaj dek mil diversaj aranĝoj estis kontentige prizorgataj. Sed nenio homa estas senmanka. Okazis, ke la gefinnoj kaj la gepoloj ne estis akceptataj je la kajo, kiam la du ŝipoj albordiĝis en Stokholmo. Neniu bedaŭras tion pli ol LKK mem. La unua tute natura ekkolero malaperis kiel nubeto sur la some-ra ĉielo. Poste regis paco kaj harmonio.

\*

La fulmotondra kunveno de UEA tre surprizis la svedojn, kiuj unuafoje ĉeestis universalan kongreson. Kiam ĉiuj samtempe stariĝis por konvinki la kontraŭulojn pri la praveco de respektivaj konceptoj, la kongresa ejo similis al papaga kaĝo. Mi kredas, ke la benkoj de la parlamenta ĉambro iom ekremis, kiam ili aŭdis la muĝegon de la senbridaj vortkaskadoj. Sed post fulmotondro sereniĝas la ĉielo. Sveda proverbodiras: La fino bona — ĉio bona.

\*

La ekspozicio de UEA en la halo de la kongresejo vekis sufiĉe grandan atenton. La iom-post-iomaj informoj pri eldono de turismaj flugfolioj estas ne tre konsiderataj de la publiko. Sed kiam ĉio estas kolektita unuoloken, la ekspozicio frape pruvas kiajn poziciojn nia lingvo atingis. Ni eluzu la ekspozician materialon! Bonega propagando!

\*

La ekskurso al Saltsjöbaden estis tre agrabla. La ridetantaj bordoj de Mälaren, la homoj sur la pontoj, la idiliaj dometoj kaj domoj kun la blu-flavaj flagoj sur la pintoj de la stangoj, la mola naturo kaj la bela vetero, ĉie donis neforgeseblan impreson pri la beleco de la sveda insularo.

\*

Tiuj, kiuj ĉeestis la filmprezentadon en Palladium, verŝajne travivis gravan historian momenton. Unuafoje tutvespere esperanta filmo aperis sur la ekrano. Ni konstatis, ke Esperanto estas klara kaj uzebla filmlingvo. Ĝi estas la ŝlosilo de



*LKK-ano post la kongreso . . . .*

la parolfilmo. Ĝi malfermas preskaŭ neimageblajn avantaĝojn. Ni esperu pri la venko de la racio.

\*

Multaj dancemuloj kolektiĝis en la Blua halo de la Urbdomo. Sed malgraŭ la granda nombro de la partoprenantoj la halo aspektis vastega. Ni ne estis devigataj danci sur la piedfingraj pintoj unu de la alia. Sur la galerio kaj en la pompa Ora salono kaj ĝiaj apudaj ĉambroj kaj koridoroj estis sufiĉe da loko por promeno.

\*

La italoj kaptis ĉiujn okazojn por propagandi. Per belegaj filmoj kaj elokventaj prelegoj, per persona varbado kaj persvada mangimnastiko niaj samideanoj tentis nin. Ili promesis pli imponan kaj belan kongreson ol la svedan. Ni kredas la certigojn de la reklaminatoj, kaj jam mi komencis ŝpari la unuajn centimojn. Revido!

\*

Mi ne scias, ĉu la disdonado de medaloj estas finita. Sed se iu meritas tian, certe nia hispana amiko Loyola estas konsiderinda. Vi memoras lin. Li estas la bonhumora hispano kun la fotografia aparato. Mi neniam vidis pli fervoran eternigiston de la kongresaj situacioj. Lume aŭ mallume, en pluvo kaj sunbrilo, eksterdome kaj interne, ĉiam kaj ĉie li laboras. Neniam li koleras.

Fine. Mi provis surpaperigi kelkajn impresojn. Ilia valoro eble estas nula. Tio ne gravas. Mi estas konvinkita, ke vi, kara leganto, kiel mi, estas kontena kaj esprimas al la svedaj aranĝintoj elkoran dankon pro ĉio agraba — neforgesebla kaj inspira —. La memoroj restas.

*Fariljo.*

## Festa antaŭkongreso en Malmö.

Vespere la 1an de aŭg. regis vere vigla vivo en la Reĝa Atendsalono de la ĉefstacio de Malmö. Are kaj unuope alvenis la kongresanoj, kiujn oni akceptis ĉe la vagonaroj kaj ŝipoj kaj gvidis al la loĝejoj.

La 2an de aŭg. estis la akceptejo en la urbodomo, kie ankaŭ poŝtejo, skribejo ktp. estis je dispono. Je la 10.45 komenciĝis rondveturo tra la urbo per elegantaj aŭtobusoj. Kvar grupoj sub gvidado de lokaj samideanoj vizitis inter alie la preĝejon S:ta Petro, la kastelon Malmöhus, la muzeon kaj la flugstacion Bulltofta.

Post paŭzo por lunĉo okazis je la 15a h. la solena malfermo de la kongreso en la pompa festosalono de la urbodomo. Ĉeestis ĉirkaŭ 400 personoj, inter kiuj oni rimarkis reprezentantojn por la urba estraro, ĵurnalistojn, konsulojn ktp. La honora prez., s-ro urbestro William Linder, kiu pro malsano ne povis ĉeesti, per telegramo salutis la kongreson. Post muziko kaj prologo la prezidanto de la kongreso, s-ro Erik Andersson, deziris bonvenon al la gastoj kaj esprimis sian ĝojon unufoje en la historio de la urbo vidi tiom da esperantistoj kaj aŭdi Esperanton parolatan eĉ en la urbodomo. En la nomo de la urbo salutis s-ro Emil Olsson, prezidanto de la urba konsilantaro. Lia saluto en Esperanto surprizis la ĉeestantaron kaj rikoltis tondran aplaŭdon. Sekvis salutoj de reprezentantoj de diversaj nacioj, solkanto, muziko kaj fine fotografiĝo.

Je la 6.30 okazis la festa tagmanĝo en la Maŭra Pavilono de la Popola Parko. La salono kaj la tabloj estis bele ornamitaj kaj dum la kunesto ĉi tie regis vere esperanta spirito. Okaze verkita tablokanto estis verve kantata, akompanata de la orkestro. Sekvis kelkaj paroladoj de la gastoj, per kiuj oni esprimis sian kontentecon pro la bonega aranĝo.



*Antaŭ la urbdomo de Malmö.*

Post komuna kanto de "La Espero" oni eliris por aŭskulti koncerton de la esperantista kantĥoro sub gvido de s-ro D. Hallberg. La koncerto en esperanta kaj sveda lingvoj estis tre sukcesa. La ceteran tempon de la vespero oni uzis por provi la diversajn amuzojn de la parko. Kaj la unua tago finiĝis.

Matene la 3an de aŭg. alvenis pluraj kongresanoj. Je la 10.45 oni entreprenis komunan ekskurson al la universitata urbo Lund. Ĉe la stacidomo en Lund atendis la lokaj samideanoj kun sia nova bela standardo. Procesie oni marŝis al la aŭlo de la universitato, kie okazis solena kunveno. Salutis reprezentantoj de la urbo kaj parolis la energia kaj simpatia prez. de la esperantoklubo en Lund s-ro J. Ek. La tuta programo en la aŭlo estis belega kaj kulminis kiam blanke vestitaj knabinoj enmarŝis kaj kantis kelkajn esperantigitajn svedajn kantetojn. Post la soleno oni vizitis la faman katedralon, kie okazis orgena koncerto kaj mallonga prediko esperantlingva. Kiam tiu ĝuplena tempeto pasis oni rigardis la templon, kies plej gravaj vidindaĵoj estas la Kripto kaj la mezepoka horloĝo.

En la ĝardeno de la "Industrirestauranten" atendis longaj kafotabloj. Ĉi tie la kongresanoj pasigis agrablan horon antaŭ la reveturo al Malmö. La brila aranĝo en Lund, farita de la tiea klubo, grave kunhelpis pligrandigi la ĝeneralan kontentecon de la kongresanoj.

Reveninte al Malmö oni faris promenadon tra la parkoj. En la Kastelparko okazis publika kunveno kun paroladetoj de diversaj eksterlandaj reprezentantoj.

Fine oni kolektiĝis en la restoracio de la Reĝa Parko por "adiaŭa glaso". Je la 10.25 ekiris speciala vagonaro al Stockholm.

La antaŭkongreso pasis. Restas nur la memoroj, belaj memoroj. Ke la kongreso estis bona propagando por nia afero en Malmö kaj Lund pri tio oni ne bezonas dubi. Restas nun eluzi kaj konservi la intereson por Esperanto, kiun ekvekis la antaŭkongreso en ambaŭ lokoj. Ni semu kaj semu konstante . . .

*Partopreninto.*

## **La SAT-kongreso en Valencio.**

La 14-a Kongreso de SAT okazis de 3—8 aŭg. en Valencio (Hispanio) kaj fariĝis brila sukceso por la laborista esperantomovado kaj la ideo de la mondlingvo. 376 partoprenantoj el 13 landoj atestis pri la vivoforto kaj la praktika laboro de SAT. La laborkunsidojn enkadrigis belaj eksteraj aranĝoj. La solena malfermo okazis antaŭ 1000 personoj en la Universitato, kun muziko kaj paroladoj de multnombraj reprezentantoj. La urbestro akceptis solene la kongresanojn en la urbdomo. Strata tabulo estis inaŭgurata je la nomo de D-ro Zamenhof, en ĉeesto de la urbeŝtaro. Muzika kaj literatura vespero kunigis multnombraj publikon. Okaze de la Foiraj festoj kun artfajraĵoj kaj la fama Valencian Florbatalo, kiujn ĉeestis la kongresanoj, la propagando por Esperanto estis tre ege efika.



## Societo Mondo-filmo

sen persona respondeco estas fonditaj tuj post la Stokholma kongreso. La celo de la societo estas propagandi Esperanton per pretigo de Esperanto-filmoj, Esperanto-sinkronizi jam pretajn naciajn filmojn, distribui Esperanto-filmojn kaj kunlabori kun aliaj film-entreprenoj.

Kiel estraro estis elektitaj s-roj E. Malmgren, Hj. Lindstedt kaj H. Nordkvist, ĉiuj en Stockholm.

La societo jam je la starto vekis grandan intereson. Oni ankaŭ kalkulas je tio, ke ĉiu aktiva esperantisto provos fariĝi membro de la societo. Partoprenatesto kostas 10 svedajn kronojn. Oni rajtas laŭdezire havigi al si plurajn partoprenatestojn.

Se la ĝenerala esperantopubliko aktive subtenas la filmentreprenon, ni havas la esperon pretigi vere grandiozajn planojn. Ĉiuj certe jam scias, ke al la filmentrepreno estas ligita nia konata Jean Forge-Fethke. Sed krom tio kontrakto jam estas skribita kun la mondfama filmreĝisoro Dagobert Kossmann, kiu i. a. pretigis la grandiozan filmon "Stormo super Azio".

La perspektivoj do estas bonegaj. Sed ĉiu memoru, ke la sukceso estas tute dependa de la fido de la esperantistoj. Demandojn pri Societo Mondo-Filmo sendu al la prezidanto: E. Malmgren, Heleneborgsgatan 6, Stockholm.

## Ekzamenoj.

Pro konstanta manko de loko ni ne povis raporti pri faritaj ekzamenoj. Do tie ĉi ni nur konstatas, ke dum la pasinta laborjaro, ĝis la 1 julio, nur 225 akiris la ateston pri elementa ekzameno kaj 10 pri supera. Sed ili estis kompanse tre lertaj entute. Kun granda ĝojo ni povis konstati dum nia kongreso ke la nivelo de la konversacia kapablo (de la svedoj) mirinde altiĝis kaj kun tiu ankaŭ la kuraĝo. Gratulojn kaj dezirojn pri plua sukcesa marŝado sur la bona vojo.

La provizora ekzamena sistemo dum la kongreso tre bone funkciis. Ekzamenoj ricevis blankedojn. Kun tiuj ili iris al "eminentulo", kiu kiam kaj kie ajn povis fari parton de la ekzamenoj kaj per sia nomo kaj notado konstati

la rezulton. Kun plenigita blankedo oni revenis al la "terura ĉambro", kie sidis la gekasistoj kaj ofte kelkaj ekzamenantoj, montris aŭ redonis la blankedon kaj ricevis la ateston, paginte la kotizon. Vere facila metodo aplikebla dum kongresoj kaj de izoluloj, kiuj nur hazarde trovas taŭgan ekzamenanton. La blankedo nur rilatas buŝan ekzamenadon.

La elementan ateston akiris Maria Andersson, Per Nordin, Torå Hedert, Erik Olov Nyman, Walter Johansson (la stipendiato), Erik Sandblad, Anna Backman, M. Thoraesus kaj Vladas Kazlauskas. La superan atakis dudeko, el kiuj jam finfaris ĉion 131 Gunnar Rosell, 132 Erik Nilsson, 133 Gustav Ottander, 134 Walter Liebau, 135 Bronislava Dvarionovicz, 136 Base Linde kaj 137 Gladys Moxon. La aliaj energie daŭrigas.

## Esperanto i vinterns radio.

Radiotjänst har anmodat fil. mag. Karl Söderberg att även under den kommande vintern hålla en serie radioföredrag på esperanto. Det blir sammanlagt 8 esperantoutsändningar, i regel en per månad. Det första föredraget hålles den 23 september kl. 10—10.30 f.m. och behandlar nyutkommen esperantolitteratur (Engholms Infanoj en Torento, Lagerlöfs Gösta Berling samt Sveda Antologio).

För varje utsändning har anslagits en halv timme, vilket alltså innebär en ökning med 10 minuter per gång sedan föregående säsong. Av denna tid kommer cirka 20 minuter att disponeras för ett föredrag, som omväxlande berör något med esperanto sammanhängande problem eller ett mera allmänintressant ämne. Den återstående tiden kommer att ägnas åt grammatiska och andra språkliga kommentarer, däribland svar på frågor av mera allmänt intresse från lyssnarna. Dyliga frågor insändas direkt till kursledaren (adr. Kungsgatan 10 a, Upsala) eller via Radiotjänst (Kungsgatan 8, Stockholm).

I likhet med under vårterminen utsändas i samband med varje föredrag ett slags studiebreve, innehållande dels en resumé av föredraget, dels ordförteckning och kommentar. Hänvisningar

# Slaget vunnet —

Stockholms-kongressen blev en vacker victoria för esperanto och svenskt organisations-sinne. Men segern får av ingen betraktas som ett avslutat kapitel i esperantos historia i Sverige. Kongressens lyckliga genomförande visar endast, vilka möjligheter som genom förständig utnyttjande av förhandenvärande omständigheter kunna uppnås. Kongressen har gett oss den yppersta och stabilaste plattform för fortsatt arbete. Skulle vi nu tillåta oss en aldrig så kortvarig högfärdig meditation, så ha vi försuttit de chanser, som vi gemensamt skapat oss genom kongressen. Just nu gäller det att gripa tillfället i flykten.

Därför: När nu intresset för esperanto överallt i landet stegrats så kraftigt, arbeta som aldrig förr! Sätt omedelbart i gång på alla platser! Börja nybörjarkurser och fortsättningscirklar! Och ordna trevliga klubbsammanträden! God början är hälften vunnet! Om ni just nu i början på arbetsåret anstränger er ordentligt såväl i fråga om kurser som trevliga klubbsammanträden, så ökas naturligtvis medlemsantalet. Och dessa nya medlemmar komma därefter att arbeta för er och lämna er ovärderlig hjälp!

Men — arbetar ni nu dåligt — så kommer er klubb att stå still, och ni får alltså själva bära hela lasset!

Beträffande kursarbetet erhåller ni god hjälp av riksstudieledaren Einar Dahl, Uddevalla, liksom i hans handbok "Hur leder man fortsättningskurser i esperanto."

Hur man ordnar propagandan och leder esperanto-klubben beskrives noggrant i S. E. F-s handbok "La Espe-

komma att göras till de mest gängse läroböckerna. Studiebrev erhålles efter rekvisition hos Radiotjänsts föredragsavdelning, varvid samtidigt avgiften (75 öre för samtliga 8 brev) insättes på Radiotjänsts postgirokonto n:r 1302. Studiecirklar och andra lyssnargrupper, som önska mer än en serie studiebrev, erhålla rabatt och betala för 2—5 serier kr. 1:—, för 6—10 1:50 och för 11—20 kr. 2:—. Vid rekvisitionen bör alltid antalet medlemmar i cirkeln uppgivas.

ranto-klubo". Glöm för all del inte att på varje ort i landet under veckan 24—30 september anordna en

## Verda semajno.

Se sid. 29—32 i nyssnämnda handbok! Insänd rapport till S. E. F-s sekretariat över Verda Semajnos resultat!

Om "Verda semajno" arrangeras drifigt, energiskt och inte alltför pessimistiskt, bör det kunna bli kraftigt uppsving för esperanto i landet!

Men detta är ej nog. Nya uppgifter vänta oss.

Hadzi Raden Mustapha har börjat sin föredragsturné uppe i Lappland. Klubbarna ha fått planen över föredragsresan. De klubbar, som ej redan beslutat anordna föredrag, böra omedelbart tillskriva S. E. F-s sekretariat. S-ro Mustaphas föredragsresa ser ut att bli samma publiksuccé som s-ro Sinhas för ett par år sen.

Och så kommer världens första esperantofilm "Morgaŭ ni komencos la vivon"! Det är Svenska Esperanto-Förbundets förtjänst, att denna esperantofilm kommit till! Om några veckor släpps filmen ut i hela Sverige. Vi räkna med att esperantisterna ute i landet omedelbart besöka en eller flera av ortens biografägare och framställa önskemål om att filmen "I morgon börjar livet" måtte anskaffas, då filmen är synnerligen intressant och vacker. Var god observera, att filmen ges som varje annan utländsk film, alltså med inströdda svenska texter för de språkligt okunniga, medan däremot den talade dialogen är på esperanto.

Om filmen blir publiksuccé, så har därmed filmproducenternas intresse väckts för esperanto! Och därmed ha vi vunnit en så oerhörd framgång, att dess konsekvenser f. n. äro svåra att överblicka. I varje fall skall Du göra allt för att väcka intresse för esperantofilmen. Du har då gjort esperanto en sådan tjänst som kanske aldrig förr!

Här har jag nu antecknat några av de tankar och uppgifter, som synas ligga oss närmast.

Men framför allt: läs inte fast esperantoarbetet vid några strängt bundna former. Fundera ständigt ut nya vägar, pröva nya metoder och sist men viktigast: Utnyttja alltid vunnen seger!

Stockholm efter kongressveckan

*Ernfrid Malmgren.*

# Roma, la loko 1935!

La ĉefo de la itala registaro, la "Duce" Benito Mussolini, donis al la italaj esperantistoj oficialan permeson inviti por 1935 en Roma la 27-an Universalan Kongreson de Esperanto.

Kaj diras niaj italaj amikoj:

Fine, en 1935, italaj esperantistoj gastigos la gesamideanojn el ĉiuj nacioj de l' mondo, en grandioza Kongreso, inter la majestaj monumentoj de jarmila civilizo antaŭ senkomparaj famaj naturaj belaĵoj: kaj jam nun deziras al siaj gastoj kaj amikoj la plej belan, ravan vojaĝon, la plej dolĉan neforgeseblan rememoron pri la eterna urbo kaj pri la tuta lando Italio, sopiro de poetoj, paradizo de turistoj, tero de floroj kaj poezio.

Ne diru ke vi vizitos Roma, la kongresurbon: sciu jam nun, kaj diru, ke vi vizitos Italion, la tutan senfine belan Italion, la kongreslandon!

Por tiu celo oni organizos por vi tute novan, originalan, ravan programon.

Ne timu la varmon! Per sagaca organizo, oni ne tenos vin dum sep tagoj "kuiiri" sur varma asfalto: sed oni kondukos vin apud la maron, sur la maron mem. Spirante libere la freŝan maran venteton, flarante la salan parfumon de l' maro kaj la sanecan parfumon de pinarboj, vi festos la brilan, la grandan kongreson migrantan, gustumante la faman Sicilian frostan glaciaĵon, la bonan malvarman italan vinon, en libera aero; travivante sur montoj, lagoj kaj maro, vere idilian libertempon....

La koncentrigo de la kongresanoj okazos en urboj apud la limoj; post mallonga ripozo kaj vizitoj al lagoj kaj glaciejoj de alpoj, per specialaj trajnoj, la diversaj grupoj de kongresanoj daŭrigos al Firenze kaj al Roma.

En Firenze okazos la granda koncentrigo: Firenze, lulilo de artoj kaj de l' Renesanco, estas tia rava urbo, kian oni ne devas, oni ne rajtas preterlasi.

En Roma okazos la solena malfermo kaj la unuaj kongres-laboroj. Post tri tagoj, la kongresvojaĝo, per specialaj trajnoj, daŭros al Napoli, ĉe la arĝentaj ondoj sub la milda lumo de la luno; kaj tie, krom kongres-laboroj, okazos ekskursoj al la granda vulkano Vezuvo, al Pompei, al la paradiza insulo Capri, juvelo de l' maro....

Jam de la itala limo ĝis Roma kaj Napoli, kaj poste tra la lando ree al la limo, ĉion prizorgos por Vi la organiza oficejo, perfekte kaj plej malkare. Do, venante al la kongreso de Roma, vi zorgos mem nur ĝis la itala limo.

La XXVIIa Universala Kongreso estos la decida batalo kiu ebligos al nia kara lingvo Esperanto venki la grandajn malfacilaĵojn kiuj ĝis nun duonbaris al ĝi la vojon en Italio. — Se vi venos, ni venkos! Se, ne ....

*Petu tuj informojn sen via devigo al partopreno.*

*Kotizoj A: Kongresa kotizo italaj liroj 100:—; B: por familiano de kongresano 60:—; C: por gejunuloj malpli ol 18-jaraj 40:—; D: por Helpkongresanoj 40:—. Favorkotizoj por frupagantoj, kiuj pagis ĝis la 31-a de Januaro 1935: 30% rabato, ĝis la 30-a de Aprilo 1935: 20%, ĝis la 30-a de Junio 1935: 10%.*

*Adreso: Organiza Komitato de la 27-a Universala Kongreso de Esperanto, Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Em. 92, MILANO, Italio. Poŝta ĉekkonto: Esperanto-Centro Itala, Milano, N-ro 3/18715.*

## Ŝteloj dum la kongreso.

Ke granda amaso da homoj estas konvena laborkampo por ŝtelistoj, tion oni spertis dum la Stokholma kongreso. En unu sama tago en la parlamenta domo estis monoj forŝtelitaj de tri personoj, unu perdis 130 kronojn, alia 300 kr. kaj tria persono 30 kr. Ĉagrenige estas ke estis du el la svedaj kongreskomitatanoj, kiuj perdis sian monon. Dum ĉu jaroj kongreslabori, pagi sufiĉe grandan kongreskotizon kaj kotizojn por diversaj festoj, en kiuj poste ne estis okazo partopreni kaj fine al la sinjoroj ŝtelistoj pagi apartan kontribuon — jen la sorto de s-roj Pehrson kaj kongresa (prez.) Julin. =

*f. i. u. s: i. u. Julin 130:—  
s: a. r. o Julin 30:—  
f. i. u. Pehrson 300:—*

## Sveda Antologio.

Tiuj grupoj kaj izoluloj, kiuj volas partopreni ellaboron de la dua (moderna) parto de nia antologio, bonvolu sendi vian nomon kaj proponon al la instituto. La tutan vintron vi povos dediĉi al la laboro, kiu vere estas kaj interesa kaj fruktodona.

## Pasis la kongreso.

La stokholma kongreso estas pasinta. Dumlonge ni pensis pri ĝi, de ĝi ni atendis multon, kaj multon ĝi ankaŭ donis al ni. Nur tridek jarojn post la unua universala kongreso esperantista la svedoj invitis al kongreso, nur en la nuna jaro ni povis montri al la sveda publiko nekredema ke ekzistas esperantista popolo multnombra.

Kian impreson donis la kongreso al la granda publiko? Bonan. Tio estas mia konvinko. Ĉie oni demandas pri la kongreso kaj pri Esperanto, ĉie oni diras: "Estis ja grandioza kongreso". — "Ĉu Esperanto estas facila lingvo?" — "Kiom da tempo oni bezonas por ĝin lerni?"

La tero estas bone preparita. Nun venu la semado. Terkulturisto, kiu bone plugas kaj erpas sed forgesas semi en ĝusta tempo estas malbona terkulturisto kaj tiel agante li malsatos kaj malprosperos. Ĉu ankaŭ ni estos tiaj nebonaj kulturistoj?

Ne! Nun ni semu. Nun estas la ĝusta tempo. Ni devus tuj agi. Ni devas intensigi nian propagandon, ni devas aranĝi kursojn kiam estas viva la intereso de la granda publiko, ni devas semi por poste rikolti riĉe. Ne kedu, ke la homoj neesperantistaj memoros por eterne nian kongreson. Iuj memoris ĝin kelkajn tagojn, iuj memoras ĝin kelkajn semajnojn, sed malmultaj memoros ĝin tutan jaron. Tial ni devas tuj eklabori. Interrilatu kun la sekretario de SEF pri la aranĝo de kursoj en via loko, pri publika propagando, pri organizaj aferoj. Kaj ne forgesu nian tre valoran varbilon: nian korespondan kurson. Disdonu flugfoliojn pri ĝi, elmetu afiŝojn, anoncu en la ĵurnaloj vialokaj kaj rekomendu ĝin buŝe.

Freŝa laboremo, energio, persisto estu ĉe ĉiu, tiam venos ankoraŭ pli grandaj progresoj en Svedujo.

*Henning Halldor.*

2:dra upplagan av

## *Plena Vortaro de Esperanto*

har nu utkommit, med större textinnehåll än 1:sta uppl. Pris, inb. i starkt band, 15: — kr. + porto 45 öre.

Ensamförsäljare för Sverige:

**Svenska Esperantobyran** Upplandsg. 1, 3 tr. 8.g. Stockholm. Giro 53385

## Vår bilaga.

Med detta nummer av Esperanto-Tidningen följer såsom bilaga ett prospekt om Gösta Berling, Sveda Antologio samt grammofonskivan med La Espero och La Tagiĝo. Vid det här laget torde alla tre dessa stora nyheter vara omtalade i esperantokretsar över hela landet, d.v.s. det är känt att de kommit, ehuru endast ett fåtal hunnit skaffa sig dem. Under kongressen fanns det tillfälle att se och höra och det gavs många lovord.

Vi kunna giva blott ett råd: beställ dem alla eller en sak i sänder, om Ni så föredrager. Gösta Berling och Antologien äro verk, som naturligtvis ingen svensk esperantist kan undvara.

## Varning!

I samband med kongressen kommo inte endast välkomna gäster utan även (ehuru lyckligtvis ett litet fåtal) mindre önskvärda personer till Sverige. På det att landets esperantister ej må komma i obehagliga situationer, uppmanas varje klubb på förekommen anledning att före anställande eller mottagande av utländsk kursledare eller föredragshållare tillskriva S. E. F-s sekretariat. Även bland esperantister finnas ulvar i fårakläder!

## S. E. F:s sekretariat

flyttar den 15 september från Fredsgatan 4 till *Drottninggatan 18*.

## SEF:s handböcker.

Svenska Esperanto-Förbundets handböcker, 1: — kr. pr st. (för förbundsmedlemmar 50 öre), ovärderliga för varje esperantist:

1. Dahl: Hur leder man fortsättningskurser i esperanto?
2. Malmgren: La Esperanto-klubo.
3. Nylén: "Lingva kvaronhoro".
4. Rosenberg—Malmgren: Per kio ni amuzu nin?

Rekvireras hos *Förlagsföreningen Esperanto*, Fack 698, Stockholm.

## Ett vackert Sverige nummer

av LITTERATURA MONDO

den kända, i Budapest utgivna esperantotidningen, är nu tillgängligt.

Numret innehåller 64 bredspalter god esperantoöversättning av svensk litteratur av skiftande art och är alltså en prisbillig svensk antologi, lika lämplig till läsebok i kurs som till förströelse-läsning för en var.

Sändes portofritt mot en (1) krona.

### Kongressbyrån

Fredsgatan 4, Stockholm C.  
Postgiro 504 43

## Ĉie nur laŭdoj!

La granda verko *GÖSTA BERLING* vekis plej grandan intereson ne nur pro ĝia enhavo sed ankaŭ pro ĝia belega eksterajo kaj preso. Krome, ĉiuj kiuj vidis la libron miris pri la malalta prezo de tiu ĉiurilate altkvalita libro.

Kompreneble vi devas ĝin havi.

Mendu ĝin jam hodiaŭ!

Prezo: broŝ. kr. 6:—, bind. 7:50.

*ELDONA SOCIETO ESPERANTO*  
Fako 698, Stockholm 1.

## ”Nia Gazeto”,

den nya, kvicka, trevliga esperantotidningen (utgiven i Frankrike) sänder som prov mot 30 öre i frimärken sitt september-nummer med rapport om Stockholm o.s.v.

Beställes genom

*SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET*  
Sekretariatet, Fredsgatan 4  
STOCKHOLM.

## In- och Utländsk Litteratur

*Esperantoavdelning*

**Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln**  
Biblioteksgatan 12, Stockholm

## Sveda Antologio - spegulo de la sveda literaturo.

La unua volumo de la grandioza verko *SVEDA ANTOLOGIO* aperis. La partoprenantoj de la Universala Kongreso povis admiri tiun belan libron en nia vendejo. Por ke la unua volumo estus preta ĝis la kongreso, ni devis dividi la unuan parton en du volumoj. La duan volumon ni tre baldaŭ pretigos.

La prezo de vol. 1 estas: broŝ. sv. kr. 5:—, bind. 6:50.

La Antologion devas posedi ĉiu sveda esperantisto. Ĝi estas unika verko, elekto el la verkaro de la plej eminentaj svedaj verkistoj kiel Strindberg, von Heidenstam, Lagerlöf, Levertin, Hallström, Bergman k. a.

## Memorajoj de la Stokholma kongreso.

Partoprenintoj kiel ankaŭ nepartoprenintoj de la 26-a Universala kongreso en Stockholm povas havigi al si belajn memorajojn de tiu brila kongreso.

*Telereto* el stano kun engravurita urbdomo de Stockholm kaj kongresa teksto. Kr. 1:50.

(Uzebla kiel teleretoj sub glasoj, kiel cindrujoj kaj alimaniere.)

*Poŝtkartoj* el Stockholm kun kongresa teksto. Serio de 5 diversaj kartoj

Kr. 0:60.

La provizo estas nur malgranda. Tial vi tuj mendu.

*ELDONA SOCIETO ESPERANTO*  
Stockholm

## Korespondado.

Ronald Giorgis, Via Genova 76, Torino, Italujo, korespondas kun bfl sur kartoj. Interŝanĝas ankaŭ seriozajn poŝtmarkojn.

## GEFIANCĜO.

**Ivan Dahlqvist**

kaj

**Erna Ringmann**

Munkedal.

Berlin.

### **Pagi oni povas nur:**

*Pago de la kotizo okazas plej facile al la konto de la pola poŝtsparkaso sub la nomo *Pocztowa Kasa Oszczednosci-Warszawa* laŭ jenaj n-roj en jenaj landoj:*

*Aŭstrio: Wien ..... No 79.500  
Belgujo: Bruxelles ..... No 244.200  
Ĉeĥoslovakio: Praha ..... No 89.600  
Danujo: Kjöbenhavn ..... No 14.972  
Francujo: Paris ..... No 600.12  
Nederlando: s' Gravenhage.. No 145.510  
Jugoslavujo: Beograd ..... No 65.049  
Latvujo: Riga ..... No 4.030  
Svislando: Bern ..... No III.6.500  
Svedujo: Stockholm ..... No 4.312  
Italujo: Roma ..... No 1/10110  
Sur ĉiuj enpagiloj devas esti jena teksto  
*Adm.Literatura Mondo Krakow Nr.403.148**

*En aliaj landoj oni pagu:*

*Aŭstralio: L. E. Thomson, Esperanto ĉe Commonwealth Governement Savings Bank, Account Nro 496.567.*

*Estonujo: Hilda Dresen, Tallinn, Poŝtk.6*

*Hungarujo: Poŝtĉekkonto de Bleier Vilmos nro 25168.*

*Polujo: Administracia Literatura Mondo Krakow nro 403148.*

*Rumanujo: Rumana Esperanto-Instituto Cluj str. Bravilor 15.*

*Japanujo: Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Hongoo- Motomaĉi I. kaj Tokio-Do, Esperanto Fako, Tokio, Kudan, Koojimaĉi.*

*El ĉiuj aliaj landoj oni sendu poŝtmandatojn al Pocztowa Kasa Oszczednosci, Krakow, kio Adm. Literatura Mondo nr 403148, Polujo. — Ni akceptas ankaŭ intern. respondkup. poŝtajn en la valoro de 0.30 sv. fr. po unu. — Aliĝojn kaj pagojn cetere akceptas la reprezentantoj de Literatura Mondo kaj plejparte de la esperantistaj librovendistoj.*

# 300 BILDOJN KAJ 1100 TITOLVORTOJN

en la montrata densega komposto prezentas al vi la

## UNUA VOLUMO

de

# Enciklopedio de Esperanto

sur 272 teksto- kaj 112 bildopaĝoj grandformataj.

La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.

Prezo 30:— frankoj svisaj broŝurita kaj 34:— frankoj svisaj bindita. Aldonu 10 proc. por sendkostoj.

**LA PREZO ESTAS PAGEBLA EN DU EGALAJ PARTOJ.**

Tuj post pago de la unua duono ni ekspedas la unuan volumon.

El landoj, tie ĉi ne menciataj: per bankĉekoj, Postal Orders, aŭ poŝtmandatoj al

*P. K. O. Krakow, Polujo, Adm. Literatura Mondo, Nro 403.148*

aŭ per internaciaj poŝtaj respondkuponoj. Unu kuponon ni akceptas en la valoro de 0.30 sv. fr.

Eldonis Literatura Mondo kaj Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj Budapest, IX, Mester ucca 53. V. 5, Hungarujo

## Mendantoj de tri ekzempleroj ricevas unu senpagan

Novaliĝantoj al Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj rajtas ricevi ambaŭ volumojn por 14:— sv. fr.

# Flera intressanta nyheter inom esperantolitteraturen ha nu kommit.

**CHARLES DICKENS:**

**La vivo de Nia Sinjoro Jesuo.**

Lyxutförande. Illustrerad. Vackert inbunden. Kr. 6:50.

För någon tid sedan fann man bland den store diktarens efterlämnade papper manuskriptet till denna bok. Dickens berättade för sina barn om Jesu liv, men det var icke hans avsikt att giva ut en bok. Just denna omständighet, att berättelserna voro avsedda för familjen, giver dem en särskild charm.

**OLIVE SCHREINER:**

**Romano pri Afrika bieno.**

Pris häft. 5:—; inb. 6:50.

Olive Schreiner är Syd-Afrikas mest kända författare. Hennes stora verk "Romano pri Afrika bieno" möttes i början med likgiltighet eller rent av kyla, men situationen ändrades med tiden till motsatsen. Detta verk räknas nu bland de mest betydande, som skrivits på engelska språket.

**OTTO FORST DE BATTAGLIA:**

**La mistero de l' sango.**

Övers. av T. Jung. Häft. 4:—, inb. 5:50.

Ärftlighetsläran är en av de nyare vetenskapsgränarna, men ändå måste den räknas som en av de för mänsklighetens utveckling betydelsefullaste. I konkret bemärkelse gäller detta kunskapen om människans arvsanlag och raskaraktärerna.

**E. KILIAN:**

**La mondon al ni!**

Kr. 1:60.

Det är icke vår svenske Kilian som är författare till detta originalverk på Esperanto, utan en tysk yngling, vilken tillsammans med en kamrat gav sig ut på äventyr. Han skildrar nu upplevelserna under sin färd genom olika främmande länder.

**UPTON SINCLAIR:**

**Jimmie Higgins.**

Häft. 3:50.

Sinclair är en av Amerikas produktivaste och mest kända författare. Även här i landet är han känd och uppskattad och en esperantoöversättning av hans verk utgör ett värdefullt tillskott till vår litteratur.

**STELLAN ENGHOLM:**

**Infanoj en Torento.**

Häft. kr. 2:75.

Nytt originalarbete av vår populära svenske esperantoförfattare. I denna bok behandlar han barnens liv i industrisamhällena.

**WILLY WOOD:**

**Blua sango.**

Häft. kr. 2:50.

En spännande roman, första volymen i en serie utgiven i Holland till lågt pris.

**K. R. C. STURMER:**

**El notlibro de praktika esperantisto.**

Häft. kr. 4:—.

**Förlagsföreningen Esperanto, Box 698  
Stockholm 1.**